

## 700–999 paŝoj – 26 baladoj

& Homoj ĉe l' marbordo: .....	418
& Antaŭsignoj: .....	420
& Al la ĝojo: .....	422
& Tro homa sorto de iu neĝhomo: .....	424
& Jununjo staris kaj verŝis akvon: .....	426
& Senhareco: .....	428
& En kinematografejo: .....	431
& Sinklarkanto: .....	433
& Hamburgen: .....	435
& Saluto el Varsovio: .....	437
& La serpento longa: .....	439
& Ĉastemulino: .....	442
& Prefere silenti ol fie paroli: .....	444
& Brumm kaj Pipenbek: .....	446
& Haralda balado: .....	449
& Festeno: .....	452
& Mulan: .....	455
& Preciza Raporto pri la Dekkvina Kongreso en Nürenberg de nia Usona Amiko Sam Ideano: .....	458
& Agordo: .....	460
& Printempa kanzono: .....	463
& La Kri': .....	465
& Post karnavalo: .....	467
& Dolora saluto: .....	470
& Balado pri la morto de dek-du-kapa drako: .....	473
& Lilka balado: .....	476
& Promesoj: .....	479

## & Homoj ĉe l' marbordo:

< Rekante 21 el 41 batoj por strofo, entute 738 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikisto, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por "La amo estas ŝipo".>

### (#Melodio:

<:41> (o;So /dodo dore mido re do;do LaLa LaTi doLa So o;So LaLa LaLa doLa So do o;do TiTi TiTi Tido re

(#Rekantaĵe: e;So dodo dore mido re do;do LaLa LaTi doLa So o;So LaLa LaLa doLa So do o;do dodo mimi mimi mire do)

)×18 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua:

'1 Mi /vidis ilin ĉe l' marbordo  
; En bankostumo, sen rembur',  
; Reveni al natura ordo, ; Al  
pralinoj de l' figur';

(×:; **Do dancu kune en la  
ĉeno, ; ni dancu ĝis matena  
sun' ; kaj ĉiam novaj tagoj  
venos, ; esperon kaptu do je  
oportun'.**)

'2 Mi vidis ilin sen glazuro, ;  
Sen ŝminkoŝel' de civiliz' ; Kaj  
kial ilin la naturo ; Prezentis  
iam... senĉemiz'.. ..

#### ,& Dua:

'3 Vestita nur per inkognito ;  
La baronin' ne pensas plu ; Pri  
teda devo de vizito ; En la  
salonoj de l' enu'; .....

'4 Kaj se mi fidis al lorneto, ;  
Ŝi liberiĝis de bandaĝ', ; De  
brustoŝnuroj kaj korseto ; La  
ĉarmojn de matura aĝ'. .....

'5 Sed tiuj ĉarmoj sen hezito ;  
Aplikas sekvon de l' instru' ;  
Kaj siavice, por vizito, ; La  
mamoj kuras al genu'.. ..

'6 El kio ni konkludas prave ;  
Eternan veron de l' maksimum': ;  
"Se la natur' nin tenas sklave, ;  
Pli sklave tenas nin kutim'!"

.....

### **,& Tria:**

'7 Ĉe l' mara bordo eĉ ministro  
; Sin kredas en la paradiz', ;  
Kaj li dum ripoziga distro ;  
Forgesas grincon de la Kriz';

.....

'8 Li ludas nun kun sia filo ;  
Kaj donas pruvojn de kapabl' ;  
Farante per ludŝovelilo ;  
Profundajn truojn en la sabl'..

.....

'9 Ne diru, ke mi moke ŝercas  
; Per senpripensa rimo-ĵet'! ;  
Li tre verŝajne sin ekzercas ;  
Por.. fari truojn en budĝet'. ....

'10 El kio ni konkludas prave ;  
Eternan veron de l' maksimum': ;  
"Se la natur' nin tenas sklave, ;  
Pli sklave tenas nin kutim'!"

.....

### **,& Kvara:**

'11 Sinjoro Hak. – Ni lin  
suspektas ; Pri novriĉula  
pozici'. ; Ĉar sinjorino Hak  
aspektas ; Kiel  
juvelekspozici'; .....

'12 Li tre riĉiĝis, – jes ni scias,  
; Sed kie do? En kiu fak'? ;  
Aŭskultu, – nun konversacias ;  
Kun la edzin' sinjoro Hak: .....

'13 "Se tiuj nudaj hom-amasoj  
; Nun sekvus min kun karn'  
kaj ost', ; Cent kilometrojn da  
kolbasoj ; Mi farus je malalta  
kost'!" .....

'14 El kio ni konkludas prave ;  
Eternan veron de l' maksimum': ;  
"Se la natur' nin tenas sklave, ;  
Pli sklave tenas nin kutim'!"

.....

### **,& Kvina:**

'15 Kaj bankieron ni invitis. ;  
"Nin akompanu al la grot', ;  
Ĉar vi neniam ĝin vizitis, ;  
Alkuru do kun ban-trikot'; .....

'16 Ni tie banos nin libere ;  
Sen ia timo de delfen', ; Ĉar  
tiu groto taŭgas vere ; Mirinde  
kiel ban-basen'!" .....

'17 Li tiam preĝis al ĉielo ;  
Tremante kvazaŭ pro  
komplot': ; "Ho bona Di' de  
Izraelo, ; Protektu min de la..  
bangrot'!" .....

'18 El kio ni konkludas prave ;  
Eternan veron de l' maksimum': ;  
"Se la natur' nin tenas sklave, ;  
Pli sklave tenas nin kutim'!"  
.....)

## & Antaŭsignoj:

< Rekante 25 el 47 batoj por strofo, entute 752 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:47> (

/mi mifa somi rere dodo; do domi redo TiLa So So; mi mifa somi rere dodo; So Sodo mimi rere do do;

(#Rekantaĵe: SoSo dodo mimi re Tido re; so soti laso mire mi i; SoSo dodo mimi re Tido re; so soti laso mire do do o)

)×16 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua parto:

'1 /En tiu temp' ni estis bando ;  
Ne el paper', ne el kartono, ;  
Ne kiel kotiljongirlando, ; Sed  
brava band' el fajroŝtono.

(×:; **Kuris ni sur stratoj en  
juna aĝ'** ; **Ankoraŭ mankas  
ĉu la saĝ'** ; **Kuris ni sur  
stratoj en juna aĝ'** ;  
**Ankoraŭ mankas ĉu la  
saĝo.**)

'2 Hej, kiel ŝprucis la fajreroj,  
; Se kun filistroj ni petolis! ;  
Knabinoj virtaj en kameroj ;  
Sin riglis dum ni preterbolis.  
.....

'3 Kokritaj edzoj nin rigardis ;  
Okulminace kaj detruo ; Kaj  
siajn edzinetojn gardis ; Pli  
bone nun, sed tro malfrue! .....

'4 La mastroj de diboĉbutikoj ;  
Nin timis kiel nigran peston, ;  
Ĉar ni porpage per urtikoj ; Al  
ili tiklis la post...keston. ....

'5 La hundoj de l' kvartalo  
same ; evitis niajn  
noktpatrolojn, ; Se ne, ĝis la  
mateno lame ; Ili postiris  
kaserolojn. ....

'6 Finiĝis fars', – la tempo  
pasis, ; Ni burĝe portas nun  
titolojn, ; La Viv' de longe jam  
frakasis ; Tiamajn revojn kaj  
idolojn. ....

**,& Dua parto:**

'7 Antaŭ nelonge ni retrovis ;  
Nin ĉiujn ĉe amik' komuna ;  
Kaj vane komplimenti provis ;  
Reciprokante: "Ĉiam juna!"

.....

'8 Ĉar la tempiojn – sen riparo  
– ; Anserpiede stampas faldoj,  
; Kaj la ĉapitro de l' hararo ;  
Prezentas sin kundebetsaldoj.

.....

'9 Jen kiu per avida ŝmaco ;  
Fumadis dum studentaj jaroj ;  
La remburcherbojn de l'  
matraco, ; Nun pompas kun  
baroncigaroj; .....

'10 Alia, kiu tro aŭdace ;  
Konstruis sur epikurismo, ;  
Nun marŝas peze, kaj grimace;  
Li plendas jam pri  
reŭmatismo; .....

'11 La tria, kiu cikoniojn ;  
Asistis dum noktvivo peka, ;  
Nun pie flustras litaniojn ; Kaj  
hejmeniras je la deka; .....

'12 La kvara vivis per  
pruntpreno ; Aŭ dank' al  
senprovizaj ĉekoj; Nun estas  
lia entrepreno:; Pruntdoni  
kontraŭ hipotekoj! .....

'13 Ve! kamaradoj, jam aŭtune  
; Pril' vintro nin avertas signoj,  
; Ni baldaŭkantos ĉiuj kune ;  
La faman kanton de la cigoj.

.....

'14 Ni maljuniĝis, evidente, ;  
Sed pleje maljuniĝis tiu, ; Kiu  
admonis nun lamente, ; Ke ni  
ne tiel laŭte krii, .....

'15 "Ĉar," diris li al ni konfide,  
; "Filino mia min ĉagrenas, ;  
Ŝi... plidikiĝas tro perfide, ;  
Kajtionmi ne plukomprenas.

.....

'16 "Ho, kara nia," tuj ni ĥoris,  
; "Vi kadukiĝis efektive: ;  
Bruligi, kion vi adoris, ;  
Signifas morti jam dumvive!"  
.....)

## & Al la ĝojo:

< Rekante 17 el 33 batoj por strofo, entute 759 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Friedrich Schiller. El germana tradukis Kálmán Kalocsay (Norda Prismo, 58/2, paĝoj 65-66, 1958 ). Komponis Ludwig van Beethoven (9-a simfonio, 1824). Baladigis Martin Strid (2016) per divido na strofoj, strofigo na ĥoraĵoj, revicigo na ties lastaj versoj, elekto na rekantaĵo kaj enmeto na unu plia taktero.>

### (#Melodio:

<:33> (/mimi faso sofa mire; dodo remi mire re; mimi faso sofa mire; dodo remi redo do;

(#Rekantaĵe: rere mido reemilfa mido; reemilfa mire dore So o; mimi faso sofa milre; dodo remi redo dodo)

)×5 )+

### (&Strofoj:

'1 /Ĝoj! Fajrero belradia! ;  
Elizea di-filin'! ; fajrebrie ni al  
via ; templo iras, preĝi vin.

(×: **Kiel sur la pompa2j vojoj  
; suno2j sur la firmament'** ;  
**gaje marŝu, frata ge2nt'** ;  
**kiel venki la herooj!**)

'2 Ĉesu, de vi sorĉligate ; de l'  
rigora mod' la ŝir' ; ĉiuj homoj  
sentas frate, ; se vi ŝirmas per  
flugil'. .....

'3 Jen brakumoj al milmiloj ;  
Jen ĉi kis' al tuta mond'! ;  
Loĝas patro por ni, filoj! ;  
Fratoj! super stela rond'. .....

'4 Se la granda ĵet' bontrafis ;  
kaj amikon gajnis vi, ; se  
virina am' vin ravis: ; Vin  
enmiksi kun ĝojkri'! .....

'5 Jes, se eĉ nur unu koro ;  
estas via en la mond'! ; Kaj se  
ne – do vin kun ploro ; ŝtelu  
for el nia mond'. .....

'6 Ĉiu sub ĉielo glata ; donu  
sin al simpati'. ; Kie tronas  
Nekonata ; al la steloj gvidas  
ĝi. ....

'7 Ĉiu sur la Brust' Natura ;  
suĉas sukcon de la ĝoj' ; kor'  
malbona, koro pura ; sekvas  
ŝin laŭ roza voj'. .....

'8 Ŝi vinberojn, kisojn donas ;  
kaj amikon sen pridub', ; en  
volupt' la vermo dronas, ;  
vidas Dion la kerub'. ....

'9 Ĉu genuas vi, milmiloj? ; Vi  
kreinton sentas, mond'? ;  
Loĝas Li trans astro-briloj! ;  
Serĉu super stela rond'. ....

'10 En eterno de l' Naturo ;  
Ĝojo estas la risort'. ; En la  
mondhorloĝ' por kuro ; radojn  
pelas ŝia fort'. ....

'11 Ŝi el ĝermoj logas berojn, ;  
sunojn regas ŝia gvid' ; Ŝi tra l'  
spaco rulas sferojn ; trans la  
astronoma vid'. ....

'12 Esploriston ŝi alridas ; el la  
fajrspegul' de l' Ver', ; sur  
krutaĵ' de l' Virto gvidas ; ŝi la  
homon de toler', ....

'13 sur Kred-Monto sunobrila  
; flirtas ŝia flag' el or', ; ŝin tra  
l' fendo ĉerk-kovrila ; vidas ni  
en anĝel-hor'. ....

'14 Ho toleron, paciencon, ;  
fratoj, por pli bona mond'! ;  
Granda Dio rekompencan ;  
donos super stela rond'! ....

'15 Ĉu pripagi diojn? Vanto! ;  
Ĉu simili? Bela pen'! ; Venu  
ĝoji kun ĝojanto ; la mizero, la  
ĉagren'. ....

'16 Venĝ'? Kolero? En  
forgeson! ; Jen pardon' al  
malamik'! ; Liaj larmoj havu  
ĉeson, ; lin ne boru pento-pik'.

.....

'17 En ŝuldlibroj plu nenio! ;  
Mondon regu harmoni'! ; Tiel  
juĝos pri vi Dio, ; Fratoj! kiel  
juĝis vi. ....

'18 Ĝojo ŝaŭmas en pokaloj, ;  
en orsango de l' vinber', ;  
mildon trinkas kanibaloj, ;  
heroecon malesper'. ....

'19 Se rondiras la botelo, ;  
fratoj, saltu el la sid', ; ŝprucu  
ŝaŭmo al ĉielo: ; Jen ĉi glas',  
por Bon-Spirit'! ....

'20 Himnas Lin abismo stela, ;  
sera far' kun glora cit'. ; Supre,  
trans la tend' ĉiela ; Jen ĉi glas'  
por Bon-Spirit'! ....

'21 En suferoj: firma forto, ; al  
senhelpaj: ŝirma Brust', ;  
eterne al ĵura vorto, ; eĉ al  
malamik': just'. ....

'22 Virfiero kontraŭ tronoj, ;  
kvankam sangon kostu spit', ;  
al merito estu kronoj, ; kaj  
pereu al insid'! ....

'23 Fermu vin en sankta  
rondo, ; Ĵuru do kun glaso-  
lev', ; je l' Reganto de l' Stel-  
Mondo ; pri l' fidelo al la  
Dev'! .....

## & Tro homa sorto de iu neĝhomo:

< Rekante 31 el 59 batoj por strofo, entute 767 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:59> (

/mi mimi re doTi La Tido TiMi; mi mimi re doTi La Tido Ti; Mi MiMi La LaLa So LaTi LaMi; mi mimi re rere do TiTi La

(#Rekantaĵe: MiLa do Lado mi; lala sofa mi re; lala somi miLa LaTi dodo TiTi La; MiLa do Lado mi; lala sofa mi re; lala somi miLa LaTi dodo TiTi La a)

)×13 )+

### (&Strofoj:

'1 "/Inter la homoj li estis nur homo ; Nerimarkita en fluo de l' viv'.." ; Estis modesta nur neĝa atomo ; Treme sidanta sur montodekliv';

(×.; **Falas neĝ' de ĉiel' ; Frostas vintra tero ; Vilan lunon, brilan sunon ; vidas la neĝer' ; Falis neĝ' de ĉiel' ; Varmas la sufero ; Vilan lunon, brilan sunon ; ploras la neĝer'.**)

'2 Tiam okazis, ke vento kaprice ; Blovis sur ĝin kun afabla obstin'; – Tiel la vento kelkfoje ofice ; Vojon elektas de nia destin'. .....

'3 Nia atomo fariĝis neĝero, ; Kiun la vento tenadis en rul'; Vigle malsupren! – kaj antaŭ vespero ; Nia neĝero jam estis neĝbul'. .....

'4 Knaboj ĝin trovis sekvantan matenon ; Ĉe la piedo de l' monto kaj plu ; Rule ĝin puŝis sur ludoterenon, ; Kie daŭriĝis de l' bul' evolu'. .....

'5 Mire la knaboj pri ĝia konturo ; Ĝojis, – kaj lerte el tiu neĝkvant' ; Baldaŭ leviĝis en ombro de muro ; Homomajeste la neĝogigant'. .....



'6 Baskojn de l' frako vivige  
agitis ; Vento petola tra vintra  
pejzaĝ'; Du karbopecoj  
perfekte imitis ; Homan  
rigardon en lia vizaĝ'. .....

'7 Brave minace, kun  
pluvoombrelo, ; Firme li staris  
sur pedestal'; Jam  
rekompence pro longa fidelo ;  
Sur lia brusto orbrilis medal'..  
.....

'8 Nun fanfarone li levis la  
nazon, ; Nazon imponan en  
form' de kukurb', ; Ĉar por  
fieri la havis okazon: ; Venis  
aklami lin tuta la urb'. .....

'9 Ĉiuj admiris la belan  
statuon, ; Rime prikantis lin  
moda poet', ; Kelkaj eĉ havis  
kun li intervjuon, ; Kiun (kun  
bildoj) publikis gazet'. .....

'10 Tiam li estis la plej  
populara ; Homo de l' urbo, –

li estis idol', ; Tiel, ke burĝo  
eĉ laŭdoavara ; Diris: "Al tiu  
nur mankas parol'!" .....

'11 Iun matenon – (klarigu  
laŭvole ; Tian miraklon, – ĝi  
estas ja fakt') – Nia neĝhomo  
diskutis parole ; Kun  
admirantoj pri nova kontrakt':  
.....

'12 "Ĉar disvastiĝis tra l'  
mond' mia gloro, ; Kial  
modesti en ombro de mur'? ;  
Kadro pri brila el suno kaj oro  
; Bone konvenus al mia  
statur'." .....

'13 Certe, li pravis, – kun mil  
priatentoj ; Oni lin ŝovis ĝis  
suna teras'.. ; Kaj post tri tagoj  
nur kotaj fragmentoj ; restis  
memore pri pompa neĝmas'.  
.....)

## & Jununjo staris kaj verŝis akvon:

< Ripete 48 el 96 batoj por strofo, entute 768 paŝoj dum 8 minutoj. Norda Kantaro #4162. El sveda tradukis Kukoleto (1993) strofojn '1-2 kaj Martin Strid (2016) strofojn '3-8. Klarigoj (\*): '3 Estas subkomprenate ke la renkonto okazas dum vintro, kiam rozoj ne kreskas. '5 La iranton: sian ĉevalon.>

### (#Melodio:

<1,8:3> (

(So /La a So /La La So /do o Tilre /do do; mi /so o fa /mi lre do /re e lmi /do o; )×

(mi /mi mi mi /so so mi /mi ilre La /re e; do /mi lre do /So La Ti /do o lTi /La a; )×

)×7 )+

### (&Strofoj:

'1 (Ju/nunjo /staris kaj /verŝi2s /akvon ; el /puto /la2 mal/va2rma ; )× (Kaj /venis raj/dante /ju2nu/luĉ' ; sa/lutis ju/nu2njon /ĉa2r/man ; )×

'2 "Jununjo bela, jununjo ĉarma ; vi staras kial sola jen? .... Ĉu volas vi esti mia amat' ; kaj sekvi min transsablejen?"  
.....

'3 "Vian kore karan mi volas esti ; venigu al mi tri rozojn .... kiuj en ĉi jaro kreskis\* kaj ; sur propraj radikoj ripozas."  
.....

'4 Fraŭl' rajdas montojn kaj valprofundon ; sed roz' nenie ekzistas ..... Rajdas li antaŭ pentrista pord' ; kaj ene estis pentristo. ....

'5 "Se estas vi ene, elvenu vi ; kaj pentru por mi tri rozojn .... kiuj en ĉi jaro kreskus kaj ; sur propraj radikoj ripozus."  
.....

'6 La fraŭlo kiam la rozojn ricevis ; la iranton\* lasis li kuri ..... "Ĝoju vi, ĝoju vi, bela jununjo ; jen mi la rozojn akiris." .....

'7 Kiam jununjo la rozojn  
ekvidis ; komencis ŝi ĝenĝemi  
..... "Mi diris la vortojn kiel  
blagon ; mi ne kredis ke vi ĝin  
celos." .....

'8 "Se tion diris vi por blag' ;  
mi prenas ĝin por blago .....  
Mi estas via kaj vi estos mia ;  
en ĉiuj niaj vivtagoj." .....

## & Senhareco:

< Rekante 22 el 43 batoj por strofo, entute 774 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo kaj disduigo na strofoj. Klarigoj (\*): '12 Monunuo, francavro. '13 Kristana festo en komenco de januaro.>

### (#Melodio:

<:43> (

/So dodo mire doTi do do;do LaLa Lado TiLa So do;So FaFa  
FaLa SoFa Mi So;do dore mire doTi do do;

(#Rekantaĵe: dodo mimi redo mi Ti; La do dodo TiLa So do; dore  
mire doTi do do; La fa mire soTi Ti do)

)×18 )+

### (&Strofoj:

'1 /Amikoj miaj min kompatis  
; Dirante, ke mi perdas harojn,  
; Kaj efektive mi konstatis, ;  
Ke... ke mi perdas miajn  
harojn,

(×: **En la danco paŝu kara ;  
Ĉu vi estas aŭ ne hara ; Jen  
demando senkompara ; En  
la danco paŝu kara!**)

'2 Ĉar ĉiutage ekzemplero ;  
De mia malfidela trupo ;  
Forlasas min kaj... per kulero;  
Mi kaptas ĝin... en mia supo!  
.....

'3 Kaj miaj bonaj geamikoj ;  
Pretendis kun mordanta sprito,  
; Ke al fabriko de penikoj ; Mi  
ilin vendis (kun profito) .....

'4 Kaj ili ĵuris tre sincere: ;  
"Nun estas fakto, ho karulo, ;  
Ke via kapo vere-vere ;  
Aspektas kiel bilardbulo!" .....

'5 Min tre ĉagrenis tiuj mokoĵ  
; Kaj mi aĉetis kuracilon ;  
Laŭdatan en gazetavokoj ;  
Por tuj ekstermi la bacilon!  
.....

'6 Kaj la vendisto min  
konvinkis: ; "Dek litroj, ...  
estos ja necese!" ; Mi ilin  
prenis kaj... eĉ trinkis,; Sed  
bedaŭrinde sensukcese... ..

'7 Mi poste al doktoro iris ;  
Konata fame trans la maroj, ;  
Kaj sendemande tuj li diris: ;  
"Sinjor', vi venas por la haroj!  
.....

'8 Sed mi kuracos vin rapide ;  
Per novsistema energio;  
Rekreskos haroj, tre solide, ;  
Dank' al la aŭtosugestio!" .....

'9 Kaj laŭ ordono de l' doktoro  
; Mi diris aŭtosugestie: ; "Mi  
havas harojn, je l' honoro!" ;  
Kaj mi ĝin diris ĉiam, ĉie; .....

'10 Ĝin aŭdis foje strata bubo ;  
Kaj tuj dekretis kiel papo: ;  
"Vi havas harojn, jes, sen  
dubo, ; Sed certe ne sur via  
kapo!" .....

'11 Mi ne plu kredis la  
promeson ; De la scienca  
medicino ; Kaj tial serĉis la  
adreson ; De pli fidinda  
sorĉistino. ....

'12 Mi trovis ŝin kaj ĉe l'  
akcepto ; Ŝi diris: "Havu  
multajn dankojn! ; Por  
harkreskigo jen recepto, ; Ĝi  
kostas ducent-kvindek  
frankojn\*." .....

'13 Mistere kun ceremonio ; Ŝi  
flustris nun per raŭka tono: ;  
"La tagon post Epifanio\* ; Vi  
prenos grenojn el melono, .....

'14 Vi prenos denton de simio  
; Kaj voston de graveda rano ;  
kaj pistos ĉion per kranio ; De  
trimonata suĉinfano. ....

'15 Al tio ĉi vi akurate ;  
Almiksos sangon de ŝtatestro  
; Kaj krucsignante vi sabate ;  
Trifoje kraĉos tra l' fenestro.  
.....

'16 Vi poste ŝmiros per fluido  
; Laŭlonge ĉiam de l'  
vertebro..." ; Mi eĉ ne diris  
"ĝis revido" ; Sed mi forkuris  
kiel zebro! .....

'17 Mi turnis min kun nova  
kredo ; Al komercisto  
belpromesa, ; Laŭ li, nur lia  
harrimedo ; Montriĝis taŭga  
kaj sukcesa. ....

'18 Li kun rideto tre honesta ;  
Mezuris kapon kaj la nukon ;  
Kaj kontraŭ sumo tre modesta  
; Li vendis nun al mi...  
perukon!! .....



## & En kinematografejo:

< Rekante 25 el 41 batoj por strofo, entute 779 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per sveda polka melodio kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<:41> (/soso soso soofilso laso; mimi mimi miirelmi fami; rere TiiSolTi rere TiiSolTi; rere mire doTi LaSo;

(#Rekantaĵe: SoLaSoFa MiSo do ore; miimimi remi fa mi; rere TiiSoTi rere TiiSoTi; rere mire doTi LaSo; SoLaSoFa MiSo do ore; miimimi fami re do o)

)×19 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua:

'1 /Veturante en va2gono ; Sur kanapo lamri2sorta ; Vi elspeza2s pli da mono2 ; Por vojaĝ' pli malkomforta,

(×:; **Flugu la balada vorto ; alte ĝis la plafono ; Tondre draŝu2 plankon paŝu2 ; Sentu, ĉu en ĝi risorto ; Flugu la balada vorto ; alte ĝis la plafono.**)

'2 Kaj vi ĝuas malpli ĝue ; La pejzaĝon sub tunel' ; Ol sidante senenue ; En la kino sur fotel'! .....

'3 Tie ĉi amuzaj scenoj ; Vigle pasas sur l' ekran': ; Baptofest' ĉe indiĝenoj ; Meze de Baluĉistan'.." .....

'4 Tie ĉi amuzaj scenoj ; Vigle pasas sur l' ekran': ; Baptofest' ĉe indiĝenoj" ; Kun pianoakompan'.. .....

#### ,& Dua:

'5 Pli ol ĉarmo de pejzaĝo ; Densa nokto de la kino ; Vin invitas al vojaĝo ; Ĉirkaŭ via.. najbarino. ....

'6 Sed jen aktuala sceno ; Vigle pasas sur l' ekran': ; "La kaptado de baleno ; En la Norda Ocean'.." .....

'7 Sed jen aktuala sceno ;  
Vigle pasas sur l' ekran': ; "La  
kaptado de baleno" ; Kun  
pianoakompan'.. .....

**,& Tria:**

'8 Kvankam peze vi oscedas ;  
Amalvoke tra l' silent', ; Pruda  
najbarin' ne cedas ; Al facila  
tent'! .....

'9 Nun la lasta aventuro ; Dum  
aŭtomobilveturo ; De la fama  
komikul' ; (Harry Bull!)× .....

'10 Li kondukas propramane, ;  
Zigzagante kaj senplane ;  
Grimpas sur la trotuaron ; Kaj  
renversas ŝtupetaron, .....

'11 Kiu falas kunpentristo ; En  
butikon de spicisto, ; Kie tima  
klientino ; Svenas sur la  
margarino .....

'12 Dum alia, – ho hazardo! –  
; Krie dronas en mustardo.. ;  
La spicisto ekkoleras,; Tiajn  
ŝercojn ne toleras, .....

'13 Tuj li kaptas energie ; La  
pentriston, kiu ie ; Kuŝis mute  
kaj sen movoj ; En la kesto  
por la ovojn, .....

'14 Kaj per lerta piedbat' ; Lin  
resendas al la strat'..  
Intertempe Harry Bull ; Ĉe  
proksima stratangul' .....

'15 Evitante lanternfoston ;  
Pasas sur vaganta hundo, ;  
Kies li detranĉas voston ; en la  
daŭro de sekundo! .....

'16 Sed la hund' – el pura ras',  
– ; Opiniis ĝin kolbas' ;  
sKajsenplue, sen hezit' ;  
Manĝas ĝin kun apetit'.. .....

'17 Tiam tremas tra la kino ;  
Ventroskua ridgargar', – ;  
Sed.. la ĉarma najbarino ;  
Havas voĉon de barbar'! .....

'18 Sammomente, – ne sen  
kaŭzo, ; Eklumiĝas; estas  
paŭzo. ; Lampojlumas  
sunobrile; Kaj vi spertas nun  
facile, .....

'19 Ke anstataŭ najbarino ;  
Kun gracio kaj kun ĉarmo ;  
Apud vi en tiu kino ; Sidas  
nur.. ĝendarmo! .....



## & Sinklarkanto:

< Rekante 13 el 41 batoj por strofo, entute 779 paŝoj dum 9 minutoj. Norda Kantaro #4460. Pri la batalo de Kringen la 26-an de aŭgusto 1612 en Kalmara Milito inter Danujo kaj Svedujo. Verkis Edvard Storm (1781). Melodio de feroa ĉendanco. El malnova dana tradukis Martin Strid (2014). Klarigoj (\*): '1 Gudbrands dal, "Orfajra valo", estas norvega valo kaj provinco. '7 Romsdal, vala provinco inter Gudbrandsdal kaj la maro. '10 Fajroj avertaj bruliĝis sur montoj por signali pri eka danĝero. '12 Våge, Lessø kaj Lom estas parokoj. '13 Laŭgen estas la rivero en Gudbrandsdalo. '14 Nudulo, aŭ Nikso, mita homsimila estaĵo danĝera en rapidfluo.>

### (#Melodio:

<:41> (/do Ti LaLa La La Ti do o;Ti LaTi do rere do TiTi; re do Ti LaLa La LaLa Ti do o;Ti LaTi do rere do TiTi;

(#Rekantaĵe: La do La Si i;La LaLa La LaTi do Ti i La a)

)×19)+

### (&Strofoj:

'1 /Sinklar iris trans sala mar' ;  
li al Norvegujo direktus ; li  
trovis tombon en Gudbrand-  
rokar'\* ; kaj frunto tuj sanga  
aspektos.

(×:; **Ek antaŭ tag'** ; **ja venas ili trans sablejo.**)

'2 Ho Sinklar iris sur blua ond'  
; por sve2da soldo batali ; Dio  
vin helpu, vi devos grondi ; en  
herbon pro norvego fali. ....

'3 Luno palas en nokta ven' ;  
trankvile la ondoj susuras ; el  
akvo levas sin siren' ; al  
Sinklar malbonon aŭguras. ....

'4 Returnu re, vi skota vir' ;  
vin temas ja vivpereen ;  
Norvegujen veninte, jen vera  
dir' ; neniam vi venos reen. ....

'5 Mave kantas vi, venena  
ogr;o ĉar malbonŝancon  
profetas, ; kaj se mi vin kaptos

en manovr;o vin dishakigi mi pretas. ....

'6 Li velis tagojn, li velis tri ; kun si<sup>2</sup>a soldularo ; matenon kvaran, norveguja vid' ; ne volas mi veron bari. ....

'7 Al Romsdal-bordoj\* lin portis vent' ; deklaris sin malamiko ; lin sekvis viroj mil kvarcent ; kun malbona celo implika. ....

'8 Profanan bruliron ili puŝis ; homojn ĉiujn malhonoris ; ilin aĝula senpovo ne tuŝis ; kaj kraĉis vidvinon en ploro. ....

'9 Mortiĝis bebo en panja sin' ; eĉ kvankam rideto suris ; sed famo pri ĉi mizera kulmin' ; al centro de l' lando kuris. ....

'10 Fajro flamis\* kaj kuris mesaĝ' ; de unu al sekva najbaro ; ne fuĝis filoj de vala vilaĝ' ; devis pravigi Sinklaro. ....

'11 Soldato iris al reĝa milit' ; ni mem devas landon defendi ; krimbando estu malbenit' ; nun sangon malvolas atendi! ....

'12 Kampuloj de Voge, Lesej kaj Lum\* ; kun akraj hakiloj sur kolo ; en Bredebojd' kunvenis dum ; kun skoto volis parolon. ....

'13 Sub deklivon apudpasas pad' ; ni povas je Kring indiki ; preterhastas Laŭgen-fluad'\* ; en ĝin falos la malamikoj. ....

'14 Fusilo pendas ne plu sur mur' ; ĉar celos pafistoj tre spertaj ; malsekan barbon levas Nudul'\* ; sopiras al predoj ofertaj. ....

'15 Unuan pafon jen Sinklar cel' ; li kriis kaj ĉesis spiri ; la skotoj vokis: Falis kolonel' ; nin Di' de l' danĝero tiru! ....

'16 Antaŭen kampuloj! Antaŭen norveg'! ; Disbatu, disbatu for! ; Sopiris skoto hejmen re ; li ne havis ridan humoron. ....

'17 Kadavroj Kringon kvazaŭ lavango ; sufiĉe korakoj voros ; pro fluo ĉi de juna sango ; la skotaj knabinoj ploros. ....

'18 Vivanta hejmen venis neniue ; por al samlandano rakonti ; kiom danĝeras viziti tiujn ; loĝantajn en norvegaj montoj. ....

'19 Plu staras fosto en sama lok' ; niajn malamikojn minaci ; ho jen por ĉiu norvego provok' ; por vidon lian aŭdaci! .... )

## & Hamburgen:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 783 paŝoj dum 9 minutoj – se oni enlasas la multnomajn (en *kursiva* stilo) versojn. Verkis R. Korseti. Originan melodion komponis Ĝ. Mole. La 59a universala kongreso de esperanto okazis en la libera kaj hansa urbo Hamburgo en jaro 1974. La elekto de nova estraro de UEA ne estis simple rutina proceduraĵo. Verko, kies nomindekso estas ĉi tie ekspluatata, detale priskribas la okazintaĵojn. La kanzono simple resumas tiun verkon. Baladigis Martin Strid (2015) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por La plej granda kulpulo.>

### (#Melodioj:

(#Originala: /hSo mimi mimi rere mifa mido o;So mimi mimi rere mifa mido oh) ?

(#Balada: <1,5:29> (/La dore mi mi mire fare mi do; do redo dodo doLa dodo doTi; (#Rekantaĵe: La dore mi mi re falre mi; doTi reTi do Lado Ti Ti La a))

)×27 )+

### (& Strofoj:

'1 /Hamburgen venis fine por batalo ; malbonaj fortoj kontraŭ sia malo.

'4 de verko kiu kun aplomba kelko ; teoriumas pri la fina velko. ....

(×:; **Venu mastrino en la2 ĉen' ; Prenu mian manon en firma ten'.**)

'5 *Albo'*, *Aleksiev*, *Ambroĵ*, *Arafat'* ; *Pikel'*, *Plat*, *Pul*, *Popoviĉ*, *Paŭer*, *Privat'*. ....

'2 La bonon ja persone helpis dio ; kaj la malbonon Moskvo kaj Sofio, ....

'6 En Kremlo estis tre konata scio ; pro neŭtraleco de ĉi-asocio ....

'3 sed pri graveco de la puĉ-amplekso ; vi povas tamen legi en indekso ....

'7 ne povas laborista paradizo ; larĝiĝi ĝis Londono kaj Parizo, ....

'8 *Beker, Beethoven, Berman, Benaze'* ; *Borman Martin, Borman Verner kaj Burle'* .....

'9 *Marks, Miĥalski, Milojeviĉ, Minaja ; Molotov, Moric: jen kunularo gaja, .....*

'10 kaj certe spite al burĝa logiko ; eĉ kunkomplotis la Pekina kliko .....

'11 ĉar fortan emon sentis Maŭzedongo ; en Roterdamo ludi je pingpono, .....

'12 *Brant, Breĵnev Leonid, Burda, Burival'* ; *Konor, Korseti, Ĉiĉerin, Ĉoliĉ kaj Dal* .....

'13 *Dratver, Drezen, Dubĉek, Egami, Ajĥolc ; kun Ajĥhorn kaj Engels por fia negoc'*, .....

'14 kaj vi ŝajne naiva esperantisto ; vi voĉdoninta por la kontraŭkristo .....

'15 ĉu nia estas vi samideano ; aŭ kaŝe vi agentas por tirano? .....

'16 *Gete, Gonzales Aboin', Gorki, Grec'* ; *Rosa, Rel, Ribentrop, Regulo Perc'* .....

'17 *Hilova, Adolf Hitler, Hektor Hodler ; Hog, Horak, Ĥruŝĉov, Incertov, Insbruker.* .....

'18 Nu, pravis la japanaj policistoj ; akvomelonoj kaj esperantistoj .....

'19 ja saman havas ambaŭ la koloron ; sub verda ŝelo kaŝas ruĝan koron .....

'20 *Kaloĉaj, Kaŭĉki, Kaŭamura, Kiljan ; Fermas, Viŝinski, Vitek, Vogt, Varengjan* .....

'21 *Lejzeroviĉ, Lajbniĉ, Ljenin, Lion-Smit ; Ŝpur, Ŝustr, Tjeri', Tileman, Josip Tit'*. .....

'22 Demandu: "Kial verdas via stelo?" ; Respondos komplotintoj sen ŝancelo: .....

'23 "Ankoraŭ ne maturas ĉi-insigno, ; post maturiĝo ruĝos ĝi kun digno." .....

'24 *Sodjan-ruso', Ŝiler, Sekelji ; Svoboda, Sabo-Felŝe, Serdahelji* .....

'25 *Zonabend, Stalin kaj Step-Bovic kaj Stren ; Luin Franko, Luter Martin kaj amen'*. .....

'26 Sed eble io misfunkciis en la plano ; de Moskvo, Beogrado kaj tirano .....

'27 ĉar elektiĝis fine usonano ; neŭtrale iras plu la karavano. .... )

## & Saluto el Varsovio:

< Rekante 21 el 29 batoj por strofo, entute 783 paŝoj dum 9 minutoj. Tri poemojn verkis Antoni Grabowski (1912). Baladigis Martin Strid per islandaj melodio kaj rekantaĵoj de Olav rajdistrozo, Norda kantaro #4417.>

### (#Melodio:

<1,5:29> (o;so /soososo doososo soolala so3so; mifa so mire do3;so soososo sooremi faamimi doomi;fa soso soofa milso; soso lalalaa sofa mire do dore; mire mimifaa soso lafa mi re do )×27 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua poemo. La pluva tago:

'1 La /tago malvarma, malgaja, sensuna

(×:; **Se erar', li en star'** ;)

Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna;

(×:; **Kaj ruĝa brulis fla2m'. ; Milde ŝarĝon li metis sub la montkruto ; milde ŝarĝon li metis sub la monta krut'.**)

'2 Vinujo je l' muro putranta sin tenas, ..... Sed ĉiu ekblovo foliojn deprenas, .....

'3 Mia viva malvarma, malgaja, sensuna: ..... Ne haltas la ventoj kaj pluvo aŭtuna; .....

'4 Miaj pensoj sin tenas je tempoj pasintaj, ..... Sed falas en vento esperoj velkintaj, .....

'5 Ekhaltu, ho, koro malgaja, ne plendu! ..... Post nuboj la suno radias – atendu! .....

'6 Ne sola vi tiel kun sorto batalas, ..... En la vivon de ĉiu la pluvo ja falas, .....

**,& Dua poemo. La Reveno de l' Filo:**

'7 Post foresto multejara ;  
Venas filo mia kara; .....

'8 El migrado ĉiulanda ; Venas  
filo mia granda! .....

'9 En kabano mankis pano, ;  
Do elmigris li, infano: .....

'10 Nun revenas beljunulo ; Al  
hejmlando, al Vistulo! .....

'11 Kiel volus mi, patrino, ;  
Premi lin al mia sino; .....

'12 Doni volus mi festenon, ;  
Por saluti la revenon. ....

'13 Ve! ne mastras mi  
kabanon, ; Nek liberan havas  
manon; .....

'14 Mi, en mia propra domo, ;  
Estas kvazaŭ fremda homo.  
.....

'15 Ĉar al vi, fratin' pli aĝa, ;  
Post kamplimo hejmvilaĝa,  
.....

'16 Brilas, laŭ destino dia, ;  
Spel' alia, pli radia – .....

'17 Do akceptu lin, fratino, ;  
Per muziko kaj per vino! .....

'18 Li ne vidu ĉe l' festeno, ;  
Kiel premas min – ĉagreno.  
.....

**,& Tria poemo. Saluto el Varsovio:**

'19 Samideanoj, akceptu vi ;  
Korajn salutojn el Varsovi!  
.....

'20 Akceptu ilin, tra l' tuta  
mond' ; Disportu ĉien al nia  
rond'. ....

'21 Diru, ke ankaŭ sur pola ter'  
; Batas koroj por sankt-esper',  
.....

'22 Ke ankaŭ tie, apud Vistul',  
; Renkonte brilas amik-okul,  
.....

'23 Kaj etendiĝas fidela man' ;  
Sonas: "Bonvenu, samidean'!"  
.....

'24 Kvankam la nokto  
ĉirkaŭas nin, ; Ni kredas: Tago  
brilos en fin'. ....

'25 Leviĝos fine la ora sun', ;  
Kie nur steloj flagretas nun.  
.....

'26 Ektondros laŭte triumfa  
kant' ; Pri fina venko de l'  
esperant'; .....

'27 Do mi nur preĝas: Ho,  
donu Di', ; Ke ĝin ekaŭdu  
ankoraŭ mi! .....

## & La serpento longa:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 812 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Kukoleto (1986) laŭ norvega melodio de &"Drako Longa". Klarigo (\*): '13 Kvel = kiel.>

### (#Melodio:

<1,5:29> (

aa;Do /LAALALA TIDo ReRe Do; FaFa MiDo LA; LaLa LaLa  
TiLaSo LaLa; TiTi LaSoFi Mi;

(#Rekantaĵo: SoSo FiMiRe Mi Do;Re MiFiSo FiRe Mi; dodo  
LaSo MiMi SoTi La La La)

)×28 )+

### (&Strofoj:

'1 Ĉu /volas vi odon aŭdi nun ;  
Ĉu ĉendancos vi ; Temas pri  
timiga frenezo ; fraŭda  
propozici'

(×:; **Herboj kreskas en  
kampoj ; Flarindas la  
florodor' ; Gaju pro  
printempa rubekola ĥor'!**)

'2 Venis insista sciencisto, ;  
serioza hom', ; havis konon pri  
la neŭtrono, ; nukleofendebila  
atom'. ....

'3 Efika pli ol uranio ; estas  
plutoni'. ; Miru nun: unua sub  
suno ; nova ma2teri'! ....

'4 Inventis Usono sub stadiono  
; novaĵon el infer'. ; Ĝia pura  
ra2diado ; regnas ja2m sur ter'.  
.....

'5 Al japanoj uragano ; venis  
trans ocean'. ; Sed estis jena ja  
fenomeno, ; brilega fajroban'.  
.....

'6 Homoj brulis, ombre  
makulis ; sur malantaŭa mur'. ;  
Ankoraŭ drivas radioaktivaj ;  
eroj en la natur'. ....

'7 Venis poste vivokosta ; dua  
forviŝa bomb'. ; Urboj tutaj  
iĝis tuj mutaj, ; taŭgis nu2r  
por tomb'. ....

'8 Post milito moninvito: ;  
"Atomojn por la pac'! ;

Elektrofilia plu2tonio ; ne plu fariĝos minac'." .....

'9 Reaktoroj provizoraj, ; radia paradigm', ; utilaj staras dekojn da jaroj, ; posteco estas enigm'. .....

'10 Pri la rubo restas dubo: ; kiel gardu ĝin? ; Ĉu gargaro en ĝu2sta maro ; aŭ sigelo en sa2la min'? .....

'11 Problemo estas, ke ĝi restos ; perfida tradici': ; Post fino de nia civilizacio ; plu radiados ja ĝi. ....

'12 En minejoj uraniaj ; mortigas ardezoŝakt'. ; Arboj velkas, popoloj melkas ; radioaktivon per lakt'. ....

'13 Volis Hindujo havi tuj ; eblecon je eksterm'. ; Venis Kanado kvel\* kamarado, ; helpis je bomba ekĝerm'. ....

'14 Estas nur Aŭstrie sekura ; atoma reaktor': ; Abstinenco antaŭ komenco ; lasis ĝin sen labor'. ....

'15 Hejtis ŝargo en Harisburgo ; truon ŝajne tro, ; likis el dresi2ta stelo ; danĝera li2kvo do. ....

'16 Ŝatas franca ŝtato pranci ; pri politika fort', ; izola sole stara atolo ; mortas, mize2ra sort'. .....

'17 Venis la vento el oriento, ; oris la sunobril', ; forpelis vintron de nia lando, ; vojaĝis mejlojn mil. ....

'18 Subite, sen antaŭa diveno, ; sonoris radi-alarm' ; pri nova ne konata perejo. ; For politi2ka ĉarm'. ....

'19 Brulis barilo ĉe Ĉornobilo, ; rompiĝis reaktor', ; ne plu funkciis unu pumpilo, ; rimedo e2stis for. ....

'20 Malfruinformo, Soveta normo, ; pri la akcident', ; sed same misrapi2dis disen ; francpubliken atent'. ....

'21 Faris eksplodo fremdan jodon, ; malbenan materion: ; Cin perfidos ti2roido, ; plaĉas jodo al ĝi. ....

'22 Ĉu poste kultiviĝos kampo, ; ĉu kreskos la tritik'? ; Ĉu ĝin manĝi bona aranĝo ; aŭ baldaŭ malica komplik'? .....

'23 Sonas multimpona stulto ; el la parlament'; ; "Riskograda ra2diado ; venas nu2r per vent'." .....



'24 Misokazus mankoj kvazaŭ  
; nur en alia land'. ; "Ĉe ni  
eterne sekura kaverno ;  
neniam fariĝus fand'." .....

'25 Kancerroj kreskas kaj  
groteska ; feto en uter'. ; Pro  
malsaĝo kaj pigromesaĝo ;  
venenas nin atmosfer'. .....

'26 Kial fekundon naskis  
grundo, ; kial la frondabund'? ;  
Ĉu ludas hundo, flugas  
hirundo ; ne pro cela profund'?  
.....

'27 Ĉu vivos anstataŭ ni nur  
blatoj ; en radioaktiva mond'?  
; Ĉu deklaro "Homkreo eraro"  
; estos al Dio respond'? .....

'28 Se havas ni dentojn,  
spiron, sentojn, ; ruĝan sangon  
en kor', ; pelu frenezan  
mortokomplezon ;  
radioaktivan for! .....

## & Ĉastemulino:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 814 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2017) per melodio el kino "Asteriks kaj Kleopatra" kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<: 37 > (/mi3re mifa laso mire; mi3re mifa mire Ti; mi3re mifa laso mire; mi3re mifa doTi La,

(#Rekantaĵe: mi3re mifa laso mire; mi3re mifa mire Ti; mi3re mifa laso mire; mi3re mifa doTi La, SoSo mimi doTi SoTi La)

)×22 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua:

'1 /Estu pluv- aŭ sun-vetero, ;  
Pro la korpa estetik' ; Faru kun  
aŭ sen haltero ; Iom pli da  
gimnastik'.

(×:; **Tago brilas hela sune ;**  
**Nokte lumas bela lun' ;**  
**Ĉenon iru jenan kune ; Paŝu**  
**pro la oportun' ; Post**  
**rekanto plu rakontu nun.)**

'2 Ĉiutage kvaronhoron ; Vi  
dediĉu al la san' ; Ekzercante  
ĉiun poron, ; Ĉiun parton de  
organ'. .....

'3 Kaj por ke bacil' ne ĝermu ;  
Pro malsaĝa higien', ; La  
fenestrojn vi malfermu ; Post  
forigo de l' kurten'. .....

'4 Jako, veŝto, eĉ kalsono ;  
Ĝenus viajn movojn, dum ; –  
Sendepende de l' sezono – ;  
Taŭgas nur l' Adam-kostum'!  
.....

#### ,& Dua:

'5 Jen la burĝo Dikapot, ; Kiu  
vole kaj konscie ; Ĉiutage sen  
trikot' ; Gimnastikas energie.  
.....

'6 Unu, du.. la dekstra krur' ;  
Levas sin dum la maldekstra ;  
Sin apogas kontraŭ mur' ; Kio  
estas ĝuo ekstra, .....

'7 Unu, du.. nun trunkoklin' ;  
kun postaĵ-altiĝ' kontrasta, ;  
Tiel, ke la rusta spin' ;  
Refariĝu jun-elasta. ....

'8 Unu, du.. jen sur la kap' ;  
Dikapot sin tenas bone; Unu,  
du.. ĵus forta frap' ; Bruis ĉela  
pord' ordone! .....

'9 Pliinsistas jam la bru', ;  
Kvazaŭ dum koler' arpeĝoj, ;  
Kun minaco de detru' ; En la  
nomo de la leĝoj. ....

'10 "Nun malfermu, civitan" ;  
De ekstere sonas peto, ; "La  
policokapitan' ; Al vi venas  
por enketo!" .....

'11 Dikapot ĉe l' pordo-ans' ;  
Sur sin metas tablotukon, ;  
Ĉar en ĉiu cirkonstanc' ; Oni  
montru bonedukon. ....

'12 Li malfermas sen protest'..  
; Jen ĉe l' pordo vir' postenas ;  
Dum, pro lia stranga vest', ;  
Sinjorino preskaŭ svenas. ....

'13 Tuj la viro diras: "Nu, ;  
Ŝajnas, ke ni trafis ĝuste: ;  
Nuda sube de l' genu' ; Nuda  
ankaŭ ĉirkaŭbruste. ....

'14 Danku Dion, sinjorin', ; Ke  
– (la mezon inkluzive) – ; Li

almenaŭ parte sin ; Kovris,  
kvankam primitive. ....

'15 Tiel statas la afer'" ; – Li  
al Dikapot pretendas: ;  
"Kontraŭ via nud-aper' ; Tiu  
sinjorino plendas, .....

'16 Ĉar vi trude dum maten' ;  
Strange vin metamorfozas; Ĉe  
l' fenestro, sen kurten' ; Vi  
tutnuda vin ekspozas!" .....

'17 "Jes, sinjoro, tiu scen' –" ;  
Nun la sinjorin' impone ;  
Diras – "estas abomen', ; Kiu  
ĝenas min persone."

'18 "Sed permesu", – Dikapot  
; Vigle provas sin defendi, ;  
"Ja ne temas pri komplot' ; Por  
vin iel ajn ofendi, – .....

'19 Nur honeste, kun fervor', ;  
Kiel Higien' indikas, ; Mi dum  
frumatena hor' ; Pro la sano  
gimnastikas. ....

'20 Krome, vi konstatu, ke l' ;  
Plej proksima dom-najbaro ;  
Loĝas je duna mejl' ; De ĉi tiu  
trotuaro!" .....

'21 "Fakte, ja ne estas ŝanc" ; ;  
– Nun la policist' komprenas,  
"Ke je tiu ĉi distanc' ; La  
sinjoro iun ĝenas." .....

'22 Tiam la ĉastemulin' ; Ĵuras  
pure kaj lojale: ; "Kredu, ke  
mi vidas lin ; Per.. binoklo tre  
detale." .....

## & Prefere silenti ol fie paroli:

< Rekante 27 el 41 batoj por strofo, entute 820 paŝoj dum 8 minutoj. Norda Kantaro #4472. El sveda tradukis Kukoletto strofojn '1-19 (1993 loE) kaj Martin Strid la lastan '20 (2017) Klarigoj (\*): '1 La vortoj ne portas signifon. '2 Ĉoj = viraj ili. '8 Kvej = kie. '11 Aĝi kiel la diablo: Esti tre maljunega. '12 Lagon de barita rivereto havas perakvoforta muelilo. '14 Laŭ malnova superstiĉo, sorĉistinoj ne sinkas en akvo. '19 Tel = tiel.>

### (#Melodio:

<1,8:> (So /do dodo mi miSo /do do mi i; /do o mi i /do La So o;So /do domi so soso /fami fare mi i;do /La Lado So o;do /La Lado So o;So /do do remi fare /do Ti do o )×20 )+

### (&Strofoj:

'1 Sin /interkonsilis fri/ponoj du ; /skru ru /rumpum pej ; la /muelistfilinon a/tingu ili, ĉu ; Ĉar /treton en tru' ; jen /puŝas la sku' ; ĉar /treto kuŝas en la /trota rej.\*

'2 Ĉoj\* metis unun do en sak (×:; **skru ru rum pum pej** ;) ĝin portis l' alia al muelista lag'

(×:; **Ĉar treton en tru' ; jen puŝas la sku' ; ĉar treto kuŝas en la trota rej.)**

'3 – Ho, kara muelisto, mi petas en kriz' ..... muelu ĉi grenon sed sen kotiz' .....

'4 – Jes, portu la sakon al mia dom' ..... ja nek estas rato, nek muso laŭ la kon' .....

'5 Do venis fripono al muelistoj' ..... pri tiu ruzaĵo malsciis ili plej .....

'6 Kaj kiam noktiĝis, nigriĝis la vak' ..... komencis kaj ruli kaj rampi tiu sak' ; Ĉar treton en tru' ; jen skuas la ŝu' ; ĉar treto kuŝas en la trota rej.

'7 – Ho, kara patro, estu lum' ..... mi kredas, en la domo ŝtelistoj estas nun .....

'8 Kaŝiris fripono sur piedpint' ..... al lito kvej\* kuŝis la muelistfilin' .....

'9 – Ne, kara panjo, lumon for  
..... nur ludis la kato kun musa  
plor' .....

'10 Respondis praanjo kuŝanta  
sur forn' ..... – Jes, kato en  
botoj, ne mankas la spron' .....

'11 Ridetis praanjo, sendenta  
afabl' ..... ĉar same ŝi aĝis kiel  
la diabl'\* .....

'12 – Silentu, praanjo, vin  
venos hont' ..... en lagon\* de  
patro vi morgaŭ plaŭdont' .....

'13 Kaj kiam tagiĝis, kaj  
lumon al tag' ..... ŝin ĵetis ili  
maldelikate en la lag' .....

'14 Kaj flosis\* praanjo en  
akva lok' ..... ŝia ulo ululis  
irante sur la rok' .....

'15 – Ho, ulo, vi havas ja  
denton kun hok' ..... min kaptu  
je haroj kaj tiru al rok' .....

'16 Kaj la ulo per sia dento  
kun hok' ..... kaptis praanjon  
kaj tiris al la rok'.

'17 Sed la muelisto per longa  
lanc' ..... forpuŝis praanjon al  
bona pli distanc' .....

'18 Do nodis praanjo spiralon  
el dors' ..... kun plaŭdo ŝi tujis  
al fundo sen rimors' .....

'19 Finiĝu tel\* ĉiu praanjo de  
klaĉ' ..... kiu silenti ne povas  
per peka buŝaĉ' .....

'20 Sed pasas la tempo kaj je  
naŭmonata fin' ..... jen du  
bebuĉojn lulis la muelistfilin'  
.....)

## & Brumm kaj Pipenbek:

< Rekante 17 el 33 batoj por strofo, entute 825 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (La stranga butikoj, 1931). Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo. Notoj (\*): '1 Elparolu "Pipen-bek"'.>

### (#Melodio:

<:33> (

/LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La; LaLa doLa Tido reTi;  
rere doTi Lado La3;mi mi3re doTi rere mimi; mi3re doTi rere  
mimi; LaLa doLa Tido reTi; rere doTi Lado La La a

)×5 )+

### (&Strofoj:

#### ,& I-a Etaĝo. Du amikoj:

'1 /Du amikoj tre intimaj ; Jam  
de jaroj pli ol dek ; –  
(Kvankam mense ne  
proksimaj) – ; Estas Brumm  
kaj Pipenbek.

(×.; **Amiko mia male diras ;  
Pike li parolas, tiras ; kun  
sentencoj nur sen senco ;  
mian paciencon longe.)**

'2 Brumm severmiene portas ;  
La sekecon de skelet' ; Kaj  
pofunte li eksportas ; Piajn  
pensojn de asket'. .....

'3 Pipenbek dikega estas;  
Pekemulo kun cinik'; Nur  
barakte li digestas ; La  
predikojn de l' amik'. .....

'4 Tial ambaŭ sin renkontas ;  
Kiel fajtro kaj glaci', ; Kaj  
porpruve mi rakontas ; Pecojn  
de l' konversaci'.. .....

#### ,& II-a Etaĝo. Malbonaj argumentoj de Pipenbek:

'5 Iun tagon, senavize ; Ĉel'  
amiko venis Brumm, ; Kaj li  
trovis lin surprize ; Dum  
senhonta amindum': .....

'6 Tie Pipenbek prezidis ; Al  
intima idili', ; Tie virineto  
sidis ; Sur la sofo apud li. ....

'7 Tiam Brumm pri l'  
katastrofo ; Blekis per  
tremanta voĉ': ; "Ve! – Sur sia  
propra sofo ; Li sin donas al  
diboĉ'!" .....

'8 "He pardonu", furioze ;  
Pipenbek nun grakis pli, ; "Ni  
ĵus studis serioze ; Iom da  
filozofi'. .....

'9 Se vi estus filozofo ; El la  
skol' de l' realism', ; Vi  
komprenus, ke la sofo ; Estas  
bazo de l'.. Sofism'!" .....

'10 Brumm ĉikane reparolas :  
"Tio ŝajnas stranga stud', ; Vi  
kaj ŝi ekscite bolas ; Kiel par'  
dum am-prelud'.." .....

'11 Pipenbek responde bruas, ;  
Ke per seka teori' ; Ni ne tiom  
nin instruas, ; Kiom per  
alegori'. .....

'12 "Nun komprenu, apostolo,  
; Ke ni bolis tie ĉi, ; Nur ĉar  
ĉiu.. para bolo ; Estas mem  
alegori'!" .....

### **,& III-a Etaĝo. Brumm siaflanke provas spriti:**

'13 Iun tagon Brumm  
promenis ; Tute sola tra l'  
arbar', ; Kiam jen renkonte  
venis ; Sur la vojo iu par'.. .....

'14 Kaj indigne Brumm  
rekonis ; La amikon Pipenbek,  
; Kiu kun virin' friponis ; Sur  
la lim' de l' Sesa Pek'. .....

'15 Sed tuj Pipenbek frivola ;  
Ŝiris sin el la brakum', ; Lasis  
la virinon sola ; Kaj alkuris  
nun al Brumm: .....

'16 "Ho karega, ĝis ĉi tie ; Vin  
kondukis bona vent'!" ;  
Brumm respondis ironie:  
;"Dankon pro la kompliment'  
.....

'17 Sed mi vidas ke mi ĝenis ;  
Vin dum ĉarma rendevu', ; Ĉar  
jam antaŭ ol mi venis, ;  
Ŝajnas, ke vi estis du!" .....

'18 "Tro severe vi mezuras", ;  
Pipenbek ekskuzis sin, ; "Mi  
sincere al vi ĵuras, ; Ke mi eĉ  
ne konas ŝin .....

'19 Estu certa, ke resume ; Mi  
ne estas tia brut', ; Nur..  
apenaŭ palpebrume ; Mi  
respondis al salut'." .....

'20 "Jes, sendube, –  
palpebrume", ; Brumm  
konkludis, – "Bone, sed ;  
..Palpe multe pli ol..*Brumm'e*,  
; Tio estas mia kred'! .....

**,& IV-a Etaĝo. Brumm  
kaj Pipenbek parolas pri  
la vetero:**

'21 Iun tagon, frumatene ;  
Ambaŭ marŝis tra la land', ;  
Kiam sinjorin' senĝene ;  
.."Strange sidis" ĉe l' vojrand'.  
.....

'22 Pipenbek ĉi tiun bildon ;  
Tuj absorbis kun avid';  
Brumm permane faris ŝildon ;  
Por protekti son de l' vid', .....

'23 Kaj por kapti bonintence ;  
La atenton de l' amik' ;  
Brumm parolis nun sentence ;  
Pri l' vetero kun taktik': .....

'24 "Bela tago, mia kara, ;  
Vere dolĉa majmaten', ;  
Majmateno senkompara ;  
Porekskurso kaj promen'.." .....

'25 Pipenbek konsentis plene ;  
Kaj respondis kun komplez': ;  
"Jes, hodiaŭ frumatene ;  
Estas.. bela postaĵmez'!" .....



## & Harald a balado:

< Rekante 19 el 33 batoj por strofo, entute 825 paŝoj dum 10 minutoj. Sur bazo de artikolo de Jens Stengaard Larsen ([http://www.liberafolio.org/Members/jens\\_s\\_larsen/kiu-efektive-estis-blinkenberg](http://www.liberafolio.org/Members/jens_s_larsen/kiu-efektive-estis-blinkenberg)) verkis Martin Strid (2016) laŭ melodio kaj rekantaĵo de feroa Foka balado (Kópakvæðið). Klarigojn vidu post la strofoj.>

### (# Melodio:

#Kópakvæðið: <:33> (/SoSo SoFa MiRe SoSo; do dore dodo;  
TiLa LaLa LaLaLa TiLa; LaSo SoLa SoSo;

(#Rekantaĵe: FaMi ReMi Fa So; dodo dore dodo; TiLa LaLaLa  
LaLa TiLa;La LaSo SoLa SoSo; FaMi ReMi Fa So o)

)×25 )+

### (& Strofoj:

'1 /En popola altlernejo ;  
Harald\* instruas, ; Junularan  
Federacion ; klere kontribuas.

(×:; **Bonas jen por danci ;  
Nova estas dom', ; trajtoj  
estas el fer' faritaj, ;  
tegmento plumba krome. ;  
Bonas jen por danci.)**

'2 Diras Harald al Andreo\*: ;  
"Lingva profesoro!" ; Pri  
vortaro mi havas ideon ; sed  
estas amoro'." .....

'3 Harald estas pacifisto, ;  
senperforton kredas. ; En  
lernejoj por rezisto\* ; li  
prelege pledas. ....

'4 Registaro de la danoj ;  
postulas pli da justo. ;  
Kunlaboro kun germanoj ;  
kolapsas en aŭgusto\*. ....

'5 Ekas ĝenerala striko, ;  
tutlande estas. ; Okupantoj  
kun svastiko ; danojn ostaĝe  
arestas. ....

'6 Kaptas ili en Orhus-urbo\* ;  
dek unu korifeojn, ; inter ili  
Verdaburgano\* ; Haraldon kaj  
Andreon. ....

'7 Harald kaj eminentuloj ;  
estos mortviktimoj, ; sed  
nazioj miskalkulis: ; Ĉe  
Harald mankas timo. ....

'8 Harald en malliberej' ;  
anstataŭ nenifar' ; povas per  
libroj el la hejm' ; labori pri  
vortar' . ....

'9 Vidas Andreo ĵaluza ; kiel  
diletanto ; Harald sian tempon  
uzas ; por lingvo Esperanto\* .  
.....

'10 Liberigis Andreon ili ; en  
la deka tago. ; Dudek tagojn  
Harald trankvilis ; en sia verka  
ago. ....

'11 "Harald, iru el karcero, ;  
vin armeo gracias!" ; "Sed  
restontojn ĉu danĝero ; ĉi tie  
ne minacas?" .....  
.....

'12 "Se vi ne iros en liberon ;  
kiel ni vin petis, ; vin perforte  
el karcero ; devos ni forĵeti!"  
.....

'13 Harald do reiris hejmen ;  
"Kara mia edzin', ; karaj filoj,  
mi envejne ; ĝojas vidi vin!"  
.....

'14 Vintre telefonas Andre' ;  
"Ĉu vi radjon aŭdis? ;  
Redaktisto nazia\* tre ; akre  
vin malaplaŭdis. ....

'15 Inter partioj demokratiaj ;  
en via parolad'\* ; mankis tiu  
de nazioj ; diras la "kamarad"  
.....

'16 Dormu bone, mi esperas ;  
ke mi vin revidos, ; kaj atentu,  
nun danĝeras!" ; "Ĉu? Sed mi  
ne timidos." .....

'17 Tuj de Harald la amikoj ;  
pro ĉi nova minaco ; estis tute  
en paniko ; kaj agis per  
sagaco. ....

'18 Ili Haraldon igis fuĝi ;  
trans maron al Sveduj', ; poste  
lia domo ruĝis, ; pro  
eksplodo\* tuj. ....

'19 Kun la familio "sub  
grundo"\* ; Harald konaton ;  
rerenkontis trans la Sundo\* ; –  
profesoron Blatt\* . ....

'20 "Blatt, saluton, kun  
Andreo ; antaŭ la milito ; pri  
faŝismo vi ideon ; havis\*, ĉu,  
sen spito?" .....

'21 Andreo pri la lingvo franca  
; estas ege sperta. ; Li vortaron  
tre nuancan ; verkas majstre  
lerta. ....

'22 Harald lasis ĉe li spuron ;  
pro sia metodo: ; Por Andreo  
la kulturo ; devas esti klopodo.  
.....

'23 "Vidis mi viron sen hezito  
; tajpi sian vortaron ;  
esperantan dum milito ; sen  
kulturaj baroj. ....

'24 Sed ne povas tiom facila ;  
esti lingva vojo ; dum suferas  
mi humila ; laboris li kun  
ĝojo." .....

'25 Dek jarojn post la fuĝa  
dramo ; en Montevideo ;  
kontraŭ Esperanto malamon ;  
montris Andreo\*. .....

### <& Klarigoj(\*) al Haralda balado:

'1 Harald Grønberg (1899-  
1984), danespo kaj instruisto.

'2 Andreas Blinkenberg  
(1893-1982), profesoro pri  
franca lingvo kaj romanistiko  
en universitato de Århus  
1934-1963.

'3 Kontraŭ germanoj naziaj  
kiuj dum 1940-1945 Danujon  
okupis.

'4 En la jaro 1943.

'6 Dane Aarhus aŭ Århus ;  
"Grøn borg" signifas "verdajn  
burgon".

'9 Harald publikigis danan-  
esperantan vortaron en 1949.

'14 Helge Bangsted (1898-  
1974), ĵurnalisto, estro de la  
dana nazia partio 1942-1945.

'15 En urbo Skive.

'18 Nazioj eksplodigis ĝin.

'19 Sub grundo: kaŝiganta ;  
Sundo: la markolo inter  
Slando en Danujo kaj  
Skanujo en Svedujo ; Franz  
Blatt (1903-1979), profesoro  
pri klasika filologio ek de  
1934, estis unu el la dek unu  
arestitaj ostaĝoj en Århus.

'20 En 1932 la universitata  
eldonejo de Århus eldonis  
libreton kun la titolo: "La  
faŝismo: tri prelegoj pri la  
nova Italio". Du el la  
prelegantoj estis Blinkenberg  
kaj Blatt.

'25 En Argentino en 1954  
Unesko-konferenco akceptis  
rezolucion pri Esperanto  
malgraŭ malestima  
kontraŭparolo de Andreas  
Blinkenberg, tiama delegito de  
Dajujo.>

## & Festeno:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 841 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929). Baladigis Martin Strid (2016) per feroe sudinsula melodio de Drako Longa kaj disdivido na strofoj. Vortludoj (\*): '6 Homaro – france sonon h oni ne elparolas. '10 Toleremo demokratia. '13 Klasbatalo socialisma. '15 La apetito. '18 Centra. '25 Komploto. '29 Gazeto.>

### (#Melodio:

<:29> (#Suĉuroy; /dolSo LaTi dodo dooTiTi TiLa LaSo SoMi;  
So LaTi dodo dooTiTi TiLa LaSo LaSo;

(#Rekantaĵe: MiSo So FaMi redo; do dodo re; rere mire doTi  
La;So So LalTi do o)

)×29 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Unua:

'1 /Kunsidis por festeno,  
pretegaj al atakoj, ; Dum ĝua  
koncentriĝo almenaŭ cent  
stomakoj,

(×:;Bruas danco en halo,  
dancu en ĉen'! ; Ĝojaj paŝas  
ni en esperanto-kunven'.)

'2 Kaj akra saŭcodoro simile  
al incito ; Kreskigis la  
mezuron de sana apetito. ....

#### ,& Dua:

'3 Jam kuŝis sur la tablo, – pli  
ĝuste sur l' altaro – ; La  
ofertita besto, kaj estis ĝi  
omaro. ....

'4 Omaro netranĉita, en sia  
tuta formo ; Aspektis ŝafe  
milda kajen profunda dormo;  
.....

'5 Videble pri marbordoĝi  
sonĝis sensuspekte, ; Sed saĝa  
festenano leviĝis kaj afekte  
.....

'6 Kun larma emocio li plendis al najbaro: ; "Ĝi ne efektiviĝos, la sonĝo de l' omaro\*!!" .....

### **,& Tria:**

'7 Kaj en regula takto dufoje cent makzeloj ; Movigis dum maĉado samtiom da oreloj... ..

'8 Dank' al kaprica vino ruĝiĝis palaj vangoj ; Kaj babileme tiam sin movis ĉiuj langoj. ....

'9 Pri arto, pri scienco kaj nun pri politiko ; Sagace sin ekzercis diskuto kaj kritiko, .....

'10 Sed ŝvebis harmonio eĉ super tikla temo, ; Ĉar ĉiuj sin distingis per vera... teleremo\*!!

### **,& Kvara:**

'11 Fervora komunisto predikis elokvente ; Pri nova ŝtatsistemo kaj montris argumente .....

'12 Disigajn diferencojn de diversrangaj klasoj... ; Dum fajro de l' diskuto li el najbarojglasoj .....

'13 Trinketis senatente, – sed tiu ĉi detalo ; Klarigas l' originon de ĉiu... glasbatalo!\* .....

### **,& Kvina:**

'14 Subite tra la pordo – (ĝi estis nefermita) ; Eniris grava viro kaj venis seninvita. ....

'15 Ni scias laŭ proverbo, ĉu ne, ke "la petito"\* ; Dummanĝe venas", tamen jen venis nepetito! .....

'16 Kaj tiu grava viro, suĉinte kokan oston, ; Pri sia personeco komencis longan toston. ....

'17 – La mutaj samtablanoj konjektis kun angoro: ; "Ho, Dio, kiom tostar ĉi tiu oratoro!?" – .....

'18 De Ventra\* Komitato leteron li laŭtlegis, ; Laŭ ĝi oficiale lin mem oni delegis, .....

'19 Por ke oficiale ĉeestu li festenon ; Al ĉiuj alportante oficialan benon. ....

'20 Ĝistede li insistis per tiu ĉi formulo: ; "Resume do mi estas la Oficialulo!" .....

### **,& Sesa:**

'21 En tiu ĉi momento  
veplenda ĝemsopiro ; Haltigis  
la torenton de nia verva viro,  
.....

'22 Kaj baldaŭ multobliĝis la  
krioj kaj la ploroj, ; Kaj multaj  
festenanoj tordiĝis pro doloroj  
.....

'23 Frotante ŝvelan ventron,  
kaj tiel, per mimiko, ; La  
suferantoj plendis sendube pri  
koliko! .....

'24 Jam kelkaj naivuloj kun  
tima superstiĉo ; Akuzis l'  
oratoron pri tiu malfeliĉo, .....

'25 Sed iu, almontrante al jam  
malplena poto, ; Ekkriis: "Ne!  
– Ni estas viktimoj de...  
kompoto\*!!" .....

### **,& Sepa:**

'26 Kaj nun sin manifestis  
fatalo senkompata, ; (Prefere  
mi silentus pri punkto  
delikata!) .....

'27 Sed malgraŭ diskretemo de  
ĉasta embaraso ; Aŭdiĝis bru'  
simila al eksplodanta gaso, .....

'28 Kaj sub venĝanta premo  
perfida de skrupulo ; Honteme  
ekruĝiĝis... la Oficialulo!... .....

### **,& Oka:**

'29 Saĝuloj tuj konkludis,  
facile, sen enketo: ; "La  
Oficiala... Gaseto\*!!" .....

## & Mulan:

< Rekante 27 el 53 batoj por strofo, entute 848 paŝoj dum 10 minutoj. El ĉina tradukis Saint-Jules Zee (El Ĉina Poezio, Beijing: El Popola Ĉinio, 1980). Popolkanto de la Nordaj Dinastioj (420-589 p.K.). Baladigis Martin Strid (2016) per ĉina melodio tradicia kaj aldonis rekantaĵon sur bazo de Disney-filma versio.>

### (# Melodio:

<:53> (/TiLa SoTi TiLa Lado SoSo SoMi; ReMi DoRe SoMi  
MiSo milredo doLa a;La Lado SoLa MiMi MiSo ReDo ReRe;  
MilSo redo mimi MiSo milredo doLa a;

(Rekantaĵe: LaaMiMi SoRe MiSo oo;ReMi Fa aSo Re e; LaMi  
SooReRe MiSo oo;ReMi /Fa aSo So oo;SOSO /LALA AADoRe  
/MiMi i;SO LA FalMi i; /LaaMiMi SoRe MiSo o)

)×16 )+

### (& Strofoj:

'1 "/Ho2 ve! Ho ve!" Mulan'  
laboras tie ; Si2dante antaŭ l'  
pordo su2r teksilo, ; Sed ne  
aŭdiĝas ia sono de l' naveto ;  
Kro2m ripetado de ŝia2  
ĝemspiro.

(×: **Viron el vi mi faros ; ke2  
venku vi ; Forta kiel arbaro  
; ka2j fajra kor' ; Se vi  
trovos vian centron ; vi  
venko2s ; Viron el vi mi  
faros.**)

'2 Pri kio ja, knabino, vi  
ekpensas? ; Kaj kion tiel triste  
ekmemoras?" ; "Mi pri nenio  
pensas, pri nenio, ; Nek ion  
ajn mi triste ekmemoras. ....

'3 Mi nur mobilizilon  
lastvespere ; Vidis, la  
batalantojn ĥan' kunvokas. ;  
En dekdu libroj de l' nomlisto,  
ĉie ; La nomon de la patro oni  
lokas. ....

'4 Patro ne havas ja plenaĝan filon, ; Nek mi pliaĝan fraton, do ĉevalo ; Kun ĉiaj ekipaĵoj estu preta, ; Mi anstataŭos patron en batalo!" .....

'5 Sur la vendplaco orienta oni ; Aĉetas por ŝi ĉevalon rapidan, ; Sur l' okcidenta -- selon, sur la norda ; Vipon kaj sur la suda ĉevalbridon. ....

'6 Matene adiaŭis ŝi gepatrojn, ; Vespere dormis ĉe l' Rivero Flava, ; Ne aŭdis ŝi la gepatran vokadon al filino ; Sed nur senĉesan murmuradon de ondaro sablolava. ....

'7 Matene adiaŭis ŝi l' riveron, ; Vespere dormis ĉe la Monto Nigra, ; Ne aŭdis ŝi la gepatran vokadon al filino, ; Nur tiratan henadon de ĉevaloj de la tribo migra. ....

'8 Trakuris oni fluge dek miliojn ; Tra montoj, fortikaĵoj ĝis la celo. ; La kornoj eĥis en aero frosta ; Kaj maŝkirasoj brilis en lunhelo. ....

'9 Mortis la general' post cent bataloj, ; Revenis la bravuloj post dek jaroj. ; .....

'10 La ĥan' akceptis ilin kun soleno ; En la palac' ĉe l' triumfa reveno, ; Kaj ilin rekompencis per honoraj ; Titoloj kaj grandkvant' da monoj oraj. ....

'11 La ĥan' demandis, kion Mulan volas, ; Kiu respondis: "Mi oficon altan ne bezonas. ; Por tuj reveni al la patra domo, mi esperas ; Ke via moŝt' kamelon flugan donas." .....

'12 Aŭdinte la alvenon de l' filino, ; Gepatroj kune iris al la antaŭurb' piede ; Aŭdinte la alvenon de l' fratino, ; Ŝia fratino pliaĝa sin okupis tualete ; .....

'13 Kaj jam tranĉilon la plej juna frato ; Akrigis kun fervor' por porko- kaj ŝafobuĉado. ; La pordon de la ĉambro ŝi malfermis, ; Kaj sur la lito side ripozetis, .....

'14 Demetis la soldatan kamizolon ; Kaj la malnovajn vestojn resurmetis, ; Antaŭ spegul' aranĝis la hararon ; Kaj sian tualeton ekenketis. ....



'15 Nun ŝi eliris al la  
kamaradoj, ; Kiuj miregis  
ekvidante ŝin; ; Oni pasigis  
kune dekdu jarojn, ; Sed sciis  
ja neniun, ke Mulan estas virin'.

.....

'16 Vira leporo kun ĝojsaltaj  
kruroj ; Kaj ina kun rigardo  
dolĉe brila: ; Se du leporoj tiel  
iras kune ; Kiu distingi povus  
do la inan de la vira? .....

## & Preciza Raporto pri la Dekkvina Kongreso en Nürnberg de nia Usona Amiko Sam Ideano:

< Rekante 16 el 31 batoj por strofo, entute 868 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Raymond Schwartz (Verdkata testamento, 1929) kun piednoto: (\*) Konscia misuzo de la "licentia poetica"; sed pro la rimo nia Sam-ideano vidas pli bone per la oreloj. Baladigis Martin Strid (2016) per novaj rekantaĵo kaj melodio inspirab usona himno. Klarigo (\*) '5 Germanajon trafis en la 1920-aj jaroj inflaciego.>

### (#Melodio:

<:31> (o;so /so fami mi remi mi remi mi re;mi mi remi so miso sofa mi rere; (#Rekantaĵe: rere dire re dilre fa a mi; rere do relmi so lalti la a so) )×28 )+

### (&Strofoj:

'1 "Mi /lasis Usonon, – jen grava signifo – ; Kun ĝoja ekspiro kaj... granda soifo, (×: #B: **Bravaj kamaradoj, drinku ; Babilade nin konvinku.**)

Kun belaj esperoj kaj multaj dolaroj ; Alvenis en lando de l' bravaj bavaroj.

(×: #B)

'2 Mi diros mallonge pri l' urbo kongresa, ; Ke vere ĝi estas tre, tre interesa, ..... Neniam mi vidis per propraj oreloj (\*) ; Pli multe da plenaj bierobareloj! .....

'3 Malferma kunsido! – Kortuŝa momento! ; Kaj ĉiuj ekploris dum laŭta silento, – ..... Ĉeestis multege da homoj, ververe, ; Pro manko de loko mi restis ekstere. ....

'4 Mi restis ekstere de l' homa amaso ; Kaj sidis prudente sur granda teraso, ..... Mi tie precize kun ŝaga bavaro ; Kalkulis la nombron de l' kongresanaro: .....

'5 Ne enkalkulite idistaj  
friponoj ; Sendube ĉeestis  
ducent milionoj! ..... Mi devas  
aldoni, ke tiom, en tuto, ;  
Kalkulis ni laŭ la germana  
valuto\*. .....

'6 Dum tiu ĉi tempo, per urĝa  
decido, ; Ĵus estis fermita l'  
unua kunsido, ..... Kaj ĉiuj  
aplaŭdis kaj longa ekkrio ;  
Pliigis la ĉarmon de l'  
ceremonio... .....

'7 La dua kunsido dum tri aŭ  
kvar horoj ; Sin devis okupi  
pri gravaj laboroj, ..... Mi iris,  
ĉar iom mi estis scivola, ; Kaj  
– krom prezidanto mi estis la  
sola! .....

'8 Sed la prezidanto post mia  
alveno ; Parolis ĝentile pri  
kora bonveno, ..... Kaj li min  
salutis per flataj titoloj ; En  
nomo de ĉiuj afrikaj popoloj.  
.....

'9 Responde al tiu afabla  
persono ; Mi donis salutojn el  
seka Usono, ..... Li dankis  
laŭdece kaj nun senriproĉe ;  
Ni ambaŭ ekkantis la himnon  
kvarvoĉe! .....

'10 Ni ankaŭ respektis  
kutiman programon ; Kaj  
sendis gratulan  
saluttelegramon ..... Al ĉiu  
ministro de la Respubliko, ; ...  
Ĉar tio utilas por la statistiko!!

.....

'11 Mi poste proponis, pro  
manko de loko, ; Prokrasti l'  
kunsidon ĝis nova epoko, .....  
Ni ambaŭ aplaŭdis kaj longa  
ekkkrio ; Pliigis la ĉarmon de l'  
ceremonio! .....

'12 Sed antaŭ disiro, laŭ pia  
kutimo, ; Protestis mi kontraŭ  
la seka reĝimo, ..... Kaj tuj de  
l' paroloj mi paŝis al agoj ; Kaj  
trinkis senhalte dum tutaj tri  
tagoj: .....

'13 Post tio dek horojn en lito  
mi restis, ; Kaj ellitiĝinte mi  
ree protestis, ..... Ĉar oni  
akceptis per laŭta jes-krio ;  
Pornova kongreso la urbon  
Sofio... .....

'14 Sofio, Sofio! – Ho stulta  
decido ; Plenplena je ruza  
insida perfido! ..... Ĉu do vi ne  
vidas? Kun lerta modifo ; En  
vorto "Sofio" sin kaŝas  
"SOIFO!"... .....

## & Agordo:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 871 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝt 1923) kun postnoto "(Nikolsk-Ussurijsk)". Poemo premiita dum la Oka Internaciaj Floraj Ludoj en Girona. Baladigis Martin Strid (2017) per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Petro sinjor' kaj Elinborg' kaj disdivido na strofo '15.>

### (#Melodio

<:29> (/LaLa LaMi Si LaLa LaTi doodoTi LaSo; Ti TiTi Ti do doTi doodoTi LaSo;

(Rekantaĵe: Ti TiTi La SolFa Mi LaTi do do;Ti Ti TiTi Mi LaTi doTi La a)

)×30 )+

### (&Strofoj:

#### ,&1:

'1 /Tiel lace mizere ba2tadas  
la koro, ; kiel horloĝo  
a2ntikva pro rusto...

(×: **Nun emas mi e2n danco  
jam iri ; dum rozoj, lilioj  
kreskadas tre.)**

'2 Jen ĝi knaras, jen haltas, jen  
blinda fervoro ; brue martelas  
amboson de l' brusto... ..

'3 Ho koro mia malfeliĉa, ; en  
sentoj tamen tiom riĉa, .....

'4 kial almozpetas vi amon, ;  
kial serĉas vi varmon, flamon,  
.....

'5 se via Ŝi estos neniam, ; se  
Ŝi forlasis vin por ĉiam?.....

#### ,&2:

'6 Do estas finite! Ŝi neniam  
vekiĝos, ; la nokt' kvankam  
mil kaj milfoje ektagiĝos! .....

'7 Je dormo eterna Ŝi fermis  
okulojn, ; lokiĝis por vivi  
trans grizajn nebulojn. ....

'8 Por mi restis nur kadavro  
mizera ; sen anim' sen viv' sub  
tombo hedera!... ..

'9 Ŝi mortis! Ho ve! Ŝi  
mortis!! ; Animon mian ŝi  
portis. ....

'10 Ho vane verdiĝos  
printempe arbaro ; kaj brilos  
arĝente la nokta stelaro, .....

'11 ĉar kovras jam teron  
velkintaj petaloj ; kaj ĝemas  
mortveo tra montoj kaj valoj.  
.....

**,&3:**

'12 Sekiĝis somero, alvenis la  
fino, ; mortante disiras  
koboldo, feino. ....

'13 La kordoj de l' harpo pro  
larmoj rustiĝis, ; la kantoj de l'  
koro por ĉiam mutiĝis, .....

'14 eĉ ŝajnas glacia kaj frosta  
de l' suno la flamo, ; ĉar kun  
Ŝi formortis: la Belo, la Bono,  
kaj Amo. ....

**,&4:**

'15a Per ŝia morto ; eĉ mortis  
la vivo ; kaj mi sen forto ; sur  
voj' al deklivo .....

'15b Eĉ mortis la vivo ; kaj mi  
sen forto ; sur voj' al deklivo ;  
vagadas sur tero!... .....

'15c Per ŝia morto ; la vivo  
mem mortis. ; Por min la sorto  
; suferojn alportis .....

'15d La vivo mem mortis. ;  
Por min la sorto ; suferojn  
alportis ; sen ĝoj' sen espero.  
.....

**,&5:**

'16 Ŝi jam flirtas nun en sfera  
etero, ; lasis min vagadi sola  
sur tero... .....

'17 Sola mi restis, sed sen  
animo, ; krozas ĝi treme tie ĉe  
l' limo .....

'18 de l' spaco eterna senfina  
kaj vasta... ; Ĝi flugis kun ŝia  
elspiro la lasta... .....

**,&6:**

'19 Nur febre funebre en koro  
doloro ; ĝermadas, veadas per  
muta esploro .....

'20 kaj fluas la larmoj ; kaj  
skuas mil svarmoj .....

'21 da turmentoj la koron  
batantan,... ; la koron  
sangantan... .....

**,&7:**

'22 Ho ĉesu batadi! Ĉesu do  
senti, ; pro kulpoj, ne viaj,  
vane nur penti! .....

'23 Krevu do koro, en brusto  
mizera, ; por ke finiĝu ĉi vivo  
infera... ; ĉi vivo tro tera... to  
tera!! .....

**,&8:**

'25 Ŝi atendas min! La voko  
jen sonas! ; Por trovi ŝin ĝi  
loge admonas .....

.

'26 kaj mi, eĉ ne konante la  
vojon, ; sur ter' lasante ĝojon,  
malĝojon, .....

'27 simile al lasta agordo  
fluganta ; forpasos el tera  
ekzisto tre vanta. ....)

## & Printempa kanzono:

< Rekante 35 el 67 batoj por strofo, entute 871 paŝoj dum 9 minutoj. Verkis Jopetro Danvi'. Originan melodion komponis Ĝ. Kapa kaj kantis Ĝ. Molle. Baladigis Martin Strid per la himno de Esperanto, kiun komponis F. de Menil. Klarigoj (\*): '1 La jaro 1968-a. '5 Ĉeĥoslovaka Respubliko Socialisma, kiun en tiu jaro invadis Sovetunio por venki ribelon. '8 Fama franca universitato Sorbonne.>

### (#Melodio:

(# La himno de Esperanto: <1,75:>

So3So /So Mih do3So mi3do /so o mih; So3do /mi doh so3mi  
mi3re /re e doh; So3So /So Mih do3So mi3do /so o mih; Ti3mi  
/so mih so3fi mi3ma /fi i mih;

(#Rekantaĵe: mi3mi /fa La TiTi dore /So o Lah; La3La /Ti do  
re3re ma3ma /mi i fah; So3So /So Mi do3So mi3do /so o fah;  
fa3fa /mi Soh mi3re fa3Ti /re e doh; So3So /do re;)

)×13 )+

### (&Strofoj:

< "La sesdekoka: ĉu decida jaro? memoroj pri la sesdekoka, revoj  
pri la sepdekoka, okdekoka".>

'1 estis /antaŭ majo  
sesdek/oka\*, ; knabi/netoj  
saĝe trinkis "/koka" ; kaj  
a/tente legis maga/zinojn ; ne  
fu/roris ĉie la blu/ĝinoj.

'2 gape lernis mi en gimnazio ;  
kaj min lulis dolĉe iluzioj. ;  
min amuzis tute dum vesper' ;  
la klaketoj lumaj de l' fliper'.  
.....

(×: **Kio /estas do ĉi granda  
/tio? ; Nu, ĝi /estas la  
revolu/cio ; kiu /en  
printempo gajnas /forton, ;  
do dis/voku la inspiran  
/vorton ; kantu /ĝoje.)**

'3 profesoroj tute seriozaj ;  
monologis per vakuoj frazaj ;  
kaj enuo regis sen insido ;  
super revoj foraj de rapido. ....

'4 kaj subite, iun tagon sunan,  
; venis brue al ni movinklino. ;  
sunis, estis fine de l' trankvilo  
; sunis, estis fino de aprilo. ....

'5 per flugiloj de l' facila  
vento, ; vigle alĵetitajn de  
studento ; ŝtonojn kubajn por  
C.R.S.\* ; tuj varmiĝis la etoso.  
.....

'6 ĉiunokte, ĉiutage, ; stratoj  
iĝis kraĉo sage, ; retroviĝis la  
rapido, ; klaĉe blekis televido.  
.....

'7 en parizo iris forta voko ;  
malgraŭ ŝlima stulta moko, ;  
junaj ridoj per malfermaj  
buŝoj ; forfuĝigis la maljunajn  
muŝojn. ....

'8 generalo, pro abrupta sveno,  
; ekri fuĝis en baden-badeno. ;  
la antikva krio al la bono ;  
muĝe disradiis en sorbono\*.  
.....

'9 sed alvenis fine en junio ;  
(io juna – etimologio!) ; la  
finrevo pro la suna palo. ; estis  
plena ĉiu hospitalo. ....

'10 iluzioj en la poŝoj, kaŝe, ;  
kaj amara buŝodoro maĉe, ;  
tempo kuras laŭ horloĝo trista;  
koro batas laŭ inklino brusta.  
.....

'11 jam dek jaroj fuĝis paŭte ;  
kaj esperoj kaŝe, haŭte. ; ne  
plu videblas la pavimo, ; ĉie  
ĝin superas la bitumo. ....

'12 turoj konstruiĝas kamizole  
; amasiĝas homoj laŭ-tavole. ;  
en la lando regas strangaj  
voloj, ; devas ĉiuj Vivi en  
skatoloj. ....

'13 sed revenas voke la cifer' ;  
– ĉu memoro ruza pri fliper' ?  
– ; de ĉi-deko estas jaro oka. ;  
nombroj vokas urĝe. ĉu  
provoka? ..... )



## & La Kri':

< Rekante 31 el 59 batoj por strofo, entute 885 paŝoj dum 16 minutoj. Verkis F. D. Murphy. Valson detruis al balada melodio Martin Strid (2015). Klarigoj (\*): '11 Breĵnev, sovetunia registarestro ; Carter usona prezidanto ; Hua, ĉina registro.>

### (#Melodio:

<:59> (So /mi redo re doLa So Mi; So mi redo do Tido re e; So mi redo re doLa So Mi; So La redo Ti LaTi do o;

(#Rekantaĵe: So o do o La a re e Ti TiTi Ti LaTi do re mi i; So o do o La a re do Ti TiTi Ti LaTi do So do)

)×14 )+

### (&Strofoj:

'1 Sur montoj kaj step' indianoj ; ĉasadas kun ruĝfamili'. ; Kaj se vi postulas parolon, ; kanjono respondas per kri':

(×: **Esperanto – estas la lingvo por ni, por ni! ; Esperanto – ja estas la lingvo por ni, por ni!**)

'2 En densa Afrika ĝangalo ; sovaĝaj nigruloj sen Di' ; jam solvis la lingvan problemon, ; per tam-tam' disiĝas la kri': .....

'3 Ĉe norda poluso eskimoj ; Loĝadas en neĝo, glaci' ; Kaj kiam parolo necesas ; Trans blanka dezert` sonas kri` .....

'4 Sur tuta ĉi vasta terglobo, ; en urboj de ĉiu naci' ; troviĝas la samideanoj, ; soniĝas la tutsama kri': .....

'5 Indianoj, eskimoj, nigruloj, ; urbanoj, kaj buboj, kaj ni ; jam uzas la Zamenhof-lingvon, ; do vivu, prosperu la kri': .....

'6 Post longa penad' kaj  
turmento, ; jes, venis ja fine la  
tag'; Ekflirtis en freŝa la vento  
; tutmonde la verdstela flag':  
.....

'7 Sur monto, en val'  
fruktodona, ; en urbo, vilaĝ'  
kaj kampar', ; eksonis la kanto  
belsona. ; de nenombrigebla  
fratar': .....

'8 En neĝo ĉe globaj polusoj, ;  
en varmo de granda ĝangal', ;  
ĉe ĉinoj kaj angloj kaj rusoj, ;  
triumfis la akra signal': .....

'9 Survoje de fora stelaro, ;  
raketoj en grandformaci', ;  
urĝadis tra spaca la maro ;  
gvidataj al teron de l'kri': .....

'10 En Unuiĝintaj Nacioj ; de  
tuta la delegitar' ; aŭdiĝis tre  
laŭte la krioj ; sen helpo de  
tradukistar': .....

'11 Eĉ Breĵnev\* kaj Carter\*  
kunsidis ; kun Hua\* en ĉina  
hotel', ; babilis kaj ludis kaj  
ridis ; kaj kantis sub verda la  
stel': .....

'12 "Neniam plu lingvaj  
problemoj ; kaŭzigu militon  
en mond'!" , ; proklamis la tri'  
kun manpremoj ; kaj kantis  
denove en rond' : .....

'13 Varmkora estiĝis la  
mondo, ; paciĝis ja ĉiuj popol',  
; influe de granda la rondo ;  
marŝanta sub verda simbol':  
.....

'14 Jes, bela fariĝis surtera ; la  
vivo de ĉiaj estaĵ', ; ŝanĝiĝis la  
tempo mizera ; per helpo de  
verda miraĵ': .....

'15 Subite de l' tuta epoko ;  
plu restis neniu ol mi, ; ĉar el  
la ĝardeno de l' koko ; eksonis  
vekiga la kri': .....

## & Post karnavalo:

< Rekante 21 el 37 batoj por strofo, entute 888 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis Julio Baghy (Preter la vivo, Budapeŝt 1923). Premiita dum la naŭaj Internaciaj Floraj Ludoj en Manresa. Baladigis Martin Strid (2017) per samaj melodio kaj rekantaĵo kiel por Feina sorto.>

### (#Melodio:

<:37> (a;Ti /dodo dore doTi LaaSo;So dodo dore mimi mi;mi mifa soso somi miire;do dore doTi LaLa LalSo;

(#Rekantaĵe: do mire do dodo Ti La; LaTi dodo dore mimi; mifa somi mire do; do mire do dodo Ti La) )×24 )+

### (&Strofoj:

#### ,&1:

'1 A/kordo lasta eĉ ne sonis ;  
dum karnavala luksa fest' ; kaj  
juna pastro konfespreni ;  
ekiras jam al dia nest'.

(×:; **Dancu soleca feino ;  
Venu al junula sino ; Li  
forlasos baldaŭ vin ; Dancu  
soleca feino.**)

'2 "Memento mori! Ho  
pripentu!" ; murmuras kaj  
malfermas li, ; en akompano  
de l' orgioj, ; la domon de l'  
potenca Di'. .....

'3 Pro sonoj de la  
mondplezuroj ; sopir' vekiĝas  
en la kor'. ; Turmentas ĝi kaj  
lin allogas ; fantom' eterna:  
rememor'. .....

'4 Por peli ĝin kaj havi pacon ;  
en la sopiraj kor', anim', ;  
rifuĝas li kun pia preĝo ;  
altaron de la Dipatrin'.

#### '&2:

'5 Li petas gracon, Ŝin  
rigardas ; kun pruda sento kaj  
sopir', ; ĉar eĉ la vido de l'  
ikono ; ekvekas nur amon de l'  
vir'. .....

'6 La songsoifan febran kapon  
; metante al pavima ŝton' ; li  
penas peli la tentadon ; de lin  
vokanta, monda son'. .....

'7 Li sinvenkite kaj humile ;  
ekiras al la pastra seĝ' ; kaj  
atendante konfesantojn ;  
meditas pri l' destina leĝ'. .....

'8 Kaj jen aperas por konfesi ;  
la pekojn de la mondplezur' ;  
virino bela kaj majesta, ;  
vestita lukse, en velur'. .....

**,&3:**

'9 "Ho mea kulpa! Mi  
pekanto!" ; sufloras ŝi kun  
plora spir'. ; "Pekema pli ol  
Magdaleno! ; Absolvu min vi  
sankta vir"! .....

'10 Teruran ŝarĝon de l' animo  
; veante portas mi en kor'. ;  
Turmentas ĝi kaj mi suferas ;  
pro amsoifo kaj dolor'. .....

'11 Plenĉaste amis mi junulon,  
; sed edzinigis oni min. ; Por  
havi pacon kaj forgeson ; li  
monaĥejon kaŝis sin. ....

'12 Ho, pastro, al mi lin  
konduku ; kaj regu vin dia  
kompat'! ; Rezigmus mi vivon  
eternan ; por sola kiso de l'  
amat'!" .....

**,&4:**

'13 "Rezigni devas, ho,  
virino!" ; la pastro diras flustre  
nun. ; "Mi ankaŭ havis  
amatinon, ; similan al brilanta  
sun'. .....

'14 Mi amis same tiel arde, ;  
kiel plenĉaste amis vi, ; sed

tamen devis mi rezigni, ;  
rifuĝi kun melankoli'. .....

'15 Suferis mi kaj ploris  
multe... ; Turmentis min  
sopira sent', ; ĝis fine por la  
kordoloroj ; trankvilon donis  
en silent' .....

'16 la simpla ĉambro de l'  
monaĥo ; kaj pastra servo en  
preĝej'... ; Rezigni devas, ho  
virino. ; Do iru al  
monaĥinej'!" .....

**,&5:**

'17 Simile al panter' malsata, ;  
staranta apud la viktimo, ;  
atentas ŝi pri voĉ' konata ; kaj  
kun pasio kaptas lin. ....

'18 Soife serĉas ŝiaj lipoj ; la  
lipojn de sia amat'. ; Per dolĉa  
kiso senkonscia ; ŝi ĵetas sin al  
amrilat'. .....

'19 Ŝi flustras spire kun  
volupto ; flamantaj vortoj al  
orel' ; pri febraj horoj,  
mondplezuroj, ; pri ĝu' surtera  
de l' ĉiel'. .....

'20 En tuta korpo ŝi tremadas ;  
kaj skuas ŝin freneza plor'... ;  
Pro larva ĝojo de l' revido ;  
batadas arde ŝia kor'. .....

**,&6:**

'21 Kaj la junulo jam ne estas ;  
humila pastro, sankta vir'. ; Li  
kuras kun ŝi sinforgese, ; ĉar  
pelas lin la amdelir'... ..

'22 Dum eĥas paŝoj  
frapsonantaj ; en frua horo de  
l' trankvil', ; subite, jen,  
eksonas alte ; el tur' - preĝeja  
sonoril'. .....

'23 Ĝi sonas mole kaj revoke...  
; La bronza tono plendas  
nun... ; Salutas ĝi kun son'  
malgaja ; radiojn de l' matena  
sun'... ..

'24 kaj tra l' fenestro al altaro ;  
la sunradioj ŝtelas sin ; por  
sorbi pie larmorosojn ; de la  
ploranta Dipatrin'. .....

## & Dolora saluto:

< Rekante 18 el 37 batoj por strofo, entute 935 paŝoj dum 11 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1922) "al la hungara landa kongreso en Miskolc". Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<1,5:55>(

/mi La LaLa miimimi re dore mimi; mi do dodo miimimi re dore mi i;mi La LaLa miimimi re dore miimi; mi do dodo miimimi re doTi La;

(#Rekantaĵe: mi do dodo mimi rere dore mimi; mi dodo mimi rere dore mi; mi dodo dodo mimi rere dore mimi; mi dodo mimi rere doTi La)

?

(/mi do dodo mi mimi re doTi La La;mi do dodo mi mimi re doTi La a;mi do dodo mi mimi re doTi La La;mi do dodo mi mimi re doTi La a;La So SoSo do do rere dore mi mi;mi So So mi mi rere doTi La La;La So So dodo TiTi TiTi dore mi mi;mi do do mi mi rere doTi La a)

)×17 )+

### (&Strofoj:

'1 /Ne oraj trumpetoj kun ĝoja sonoro, ; Nek liro arĝenta kun silka ruband', ; Nur kordoj obtuze sonantaj de l' koro ; Salutas vin, fratoj el tiu ĉi land'.

(×: **Fremduloj dividis nian karan landon. ; Ho, malaperu tiu raba bando! ; Ĉar ni naskiĝis kaj ni kreskis sur ĉi tero ; el ĝi kreiĝis nia korpa sang'.)**

'2 Ekfrapus mi koron por festaj akordoj, ; Por gajo solena, por ĝoja ekstrem', ; Sed kuŝas senforte, malstreĉe la kordoj, ; Sub fingro frapanta eksonas nur ĝem'. .....

'3 Jen, poplo hungara — ŝirata de vento, ; Velkfalas jam ĝia folia ornam', ; De sud', oriento, de nord', okcidento, ; Ĝin blovas samumo de arda malam'. .....

'4 Ve, poplo hungara, senfrata kaj sola, ; En nuda dezerto soifas ĝis sven'. ; Jam mankas al ĝi eĉ la revo konsola, ; Pri pluvo de amo, pri pluvo de ben'. .....

'5 Jam kie la floroj, la zumo ebria ; En vento printempa? Jam kie la pomp' ; De fruktomatur' en aŭtuno radia? ; La trunkon mordatan minacas la romp'. .....

'6 Ho, poplo hungara, popolo hungara, ; Ho nova Lazaro en kria mizer'! ; Popol' senigita! Al mondo avara ; Do petu, petegu pri seka paner'! .....

'7 Kaj — vidu la mondon! En sanga nebulo ; Droninte baraktas la tuta homar', ; Kaj ĉie inkubo, detruo kaj brulo, ; Subpremo, malamo kaj murdoprepar'. .....

'8 Ho, kiu forrabis la dolĉajn momentojn ; De temp' idilia, de kora kviet', ; Stultetajn dezirojn kaj molajn revsentojn, ; Vesperojn afablajn kun roza ridet'? .....

'9 Ho, kiu distaŭzis la ĝojajn mienojn ; Kaj ŝtelis la ruĝon de vang' de infan', ; Plenigis per dornoj de zorg' la kusenojn, ; Ho, kiu forrabis la molon de l' pan'! .....

'10 Forfluis la sango... Kaj aman florĉenon ; Ni revis post longa malama sufer'... ; Ho, kiu preparis teruran venenon ; El sango fluinta, por trinko de l' Ter'! .....

'11 Malama venen' en sovaĝa ebrio ; Pelegas Homaron al danco de Vit'. ; Kaj ludas orkestro de ĝemo, vekrio, ; Kaj supre rikanas fantom' de Milit'! .....

'12 Ho fratoj, ho fratoj, se ĉiuj trezoroj ; De ĝojo, feliĉo perdiĝis eĉ jam: ; Ni premu gardante la manojn al koroj, ; Ne lasu, ne lasu la senton de Am'! .....

'13 Se tranĉas sin mem la  
Homaro per glavo, ; Ni krii  
tra ĝemoj, dentgrincoj kaj ve':  
; La Amo: la Pravo! ĝi estas la  
Savo, ; Ĝi estas la Beno, ĝi  
estas Kre'! .....

'14 Ĝi estas radie brilanta  
lunturo ; En skua, detrua  
ciklono de mar': ; Ĝin sekvos,  
aŭ en ĥaoso, teruro, ; Abismo  
pereos la tuta Homar'! .....

'15 Kaj estas la lasta moment'  
por elekto, ; Kaj por la decido  
pri l' propra destin'! ; Al Vivo

kondukas la unu direkto, ; Kaj  
gvidas la vojo al Fin'! .....

'16 Homar', ĉu la veo ne estis  
sufiĉa? ; Ĉu volas vi ĉeson de  
ploro kaj ĝem'? ; Al alto  
serena, al ĝojo feliĉa ; Jen  
vojo, Homaro! Ho, amu vin  
mem! .....

'17 Kaj tiam sub pompe  
festantaj festonoj ; Solenaj  
fanfaroj kun ĝojharmoni', ;  
Kaj gorĝoj muĝantaj de  
hommilionoj ; Anoncos  
alvenon de l' Lando de Di'  
.....)



## & Balado pri la morto de dek-du-kapa drako:

< Rekante 13 el 25 batoj por strofo, entute 950 paŝoj. Verkis Vladimír Gazda (Frenezetaĵoj, Bratislava 1992). Baladigis Martin Strid (2016) per popolmelodio sveda "Hårgalåten" modifita kaj nova rekantaĵo.>

### (#Melodio:

<1,5:25>(

/mimi mifa mire; redo doLa Lado; doTi TiMi SiTi; LaSi LaTi dore;

(#Rekantaĵe: mimi mifa mire; redo doLa Lado; doTi TiMi SiTi; LaTi doTi La La;

)×38 )+

### (&Strofoj:

'1 Ie ege fore, ; tute ĉe mond-rando ; estis iam iu ; eta reĝolando;

(×: **Dancu kun la drako ; Tenu min je mano ; Ni ne timu morton ; Dancu kun la drako.**)

'2 en ĝi ĉio estis ; inda, bona, bela ; kaj la vivo tie ; estis – nu, fabela. ....

'3 En la lando estis ; bela ĉefa urbo; ankaŭ tie ĉiuj ; vivis sen perturbo. ....

'4 Sed post certa tempo ; jen, okazis io, ; kio metis finon ; al ĉi idilio: ....

'5 iun tagon venis ; kun bruego, krako ; al la ĉefa urbo ; dek-du kapa drako .....

'6 el la dek du faŭkoj ; fulmojn, fajron sputis - ; pro teruro granda ; ĉiu hom' ekmutis. ....

'7 Al kastelo reĝa ; l' drako sin alrulis, ; fajron elkraĉante ; tiel ĉi postulis: ....

'8 "Se vi volas plue ; vivon vian ĝui, ; la ĉefurbo devos ; al mi kontribui .....

'9 ĉiutage dek du ; junajn virgulinojn ; kaj kun ili dek du ; diversspecajn vinojn. ....

'10 Pro stomak' malbona ;  
tenas mi dieton, ; manĝi povas  
mi nur ; virgan viandeton, .....

'11 kaj bongustas pleje ; juna  
virgulino, ; se ŝin manĝi povas  
; mi kun bona vino. ....

'12 Morgaŭ la sendaĵo ; venu  
jam unua; kiam la ĉielo ; ĉesis  
esti blua .....

'13 kaj la strigoj ĥore ; en  
arbar' ululas, ; tiam  
virgulinojn ; mi plej multe  
ĝuas." .....

'14 Poste sin fortrenis ; la  
aĉega besto, ; kaŝis sin en sia ;  
apudurba nesto. ....

'15 Ĉiujn en la urbo ; granda  
tim' ekregis; ili reĝon sian ;  
tiel ĉi petegis .....

'16 ĉiuj surgenu, ; kun korŝira  
veo: ; "Savu nin, ho, reĝo, ;  
savu de l' perejo! .....

'17 Aŭdu niajn veojn, ; aŭdu  
niajn petojn, ; savu, reĝo, savu  
; niajn filinetojn!" .....

'18 Silentigis l' reĝo ; ilin per  
mansigno ; kaj al la petintoj ;  
diris li kun digno: .....

'19 "Se nin iu de la ; drako  
liberigos, ; mi filinon mian ; al  
li edzinigos. ....

'20 Kaj ĉar li ja faros ; al ni  
grandan bonon, ; tuj al li mi

cedos ; ankaŭ mian tronon."  
.....

'21 Disfamiĝis fulme ; tiu ĉi  
proklamo, ; venis tuj bravuloj  
; de l' plej bona famo .....

'22 indaj kavaliroj ; de diversa  
aĝo, ; lertaj batalantoj; ili kun  
kuraĝo .....

'23 unu post alia ; l' drakon  
venki provis; sed en tiu provo  
; ĉiuj morton trovis. ....

'24 Ekfunebriĝis l' urbo ; tuta  
senespere. ; Tamen, iun tagon,  
; jen, antaŭvespere .....

'25 sur la ĉefan placon ; antaŭ  
l' urbodomo ; venis unu bela, ;  
juna, forta homo .....

'26 kaj ekkriis laŭte: ; "Homoj,  
mi vin savos, ; kaj vi ree ĉiuj ;  
vian pacon havos!" .....

'27 "Kiel vi ĝin faros ; sen  
armil' junulo? ; Ĉar ja  
malsukcesis ; multa jam  
bravulo!" .....

'28 "Helpos al mi via ; brava  
junularo. ; Ĉiu jun viro ; post  
dudeka jaro .....

'29 venu tuj ĉi tien ; plena de  
elano; mi lin konatigos ; kun  
la batalplano. ....

'30 Lasu ĉiu hejme ; glavon  
morto-portan, ; havas ni  
armilon;pli efikan, fortan." .....

'31 Kiam venis ĉiuj, ; tuj la  
juna homo ; kunsidigis ilin ;  
en la urbodomo, .....

'32 sian planon tuj li ; al la ar'  
klarigis ; kaj al disciplino ; ilin  
li ĵur-ligis. ....

'33 Ili siavice ; ĝin aprobis  
kore, ; ĉiuj ĝin plenumi ; ĵuris  
plej fervore. ....

'34 Kiam venis nokto, ; tra la  
urb' disiris ; la junuloj. Kaj la ;  
geurbanoj miris, .....

'35 kiam vere baldaŭ ; la  
drakaĉo mortis. ; Kio tiam  
finon : al la monstro portis?

.....

'36 Tie volis ja la ;  
senkompata fato, ; ke la drako  
simple ; mortu pro malsato,

.....

'37 (ĉar post la ekago ; de la  
junaj viroj ;)× .....

'38 en la tuta urbo ; antaŭ  
nokto-fino ; restis eĉ ne unu-  
;sola virgulino! .....

## & Lilka balado:

< Originala ripete 23 sed rekante 9 el 37 batoj por strofo, entute 962 paŝoj dum 10 minutoj. Verkis kaj komponis Martin Strid (2016). Alternativaj melodio kaj rekantaĵo estas tiuj de Vilmunda balado, Norda Kantaro #4405, rekante 20 el 34 batoj por strofo, entute 884 paŝoj dum 10 minutoj.>

### (#Melodio:

(#Originala: <:37>

/(mimi soso soso somi; rere doTi LaLa;)×2

(mimi miTi dodo doLa; SoSo doTi LaLa;)×2

(#Rekantaĵe: mimi miTi dodo TiLa So SoSo LalTi do o)

)?

(#Vilmunda: <:34> /fami sofa fami mi;re rere dore mimi; miimimi fami fami faso; sofa fafamii redo;

(#Rekantaĵe: mimi fa mi re; rere dore mi; mimi mimi mi fa;so sofa fami fami reldo; mimi fa mi re e)

)×26 )+

### (&Strofoj:

'1 (&Originala:

/"Kara Lilka", diris patro, venos tuj milito. ;)× (Por plorego kaj cikatro estas ĝi invito. ;)×

(×:; **Ke la tagoj de l' homaro estu pli lu2maj.**)

?

(&Vilmunda:

"/Kara Lilka", diris patro, venos tuj milito. (×:;) Por plorego kaj cikatro estas ĝi invito.

(×:; **Dancu mastrino ; belan elektas mi. ; Dancu min al mano ; ja bele kiel povas vi2. ; Dancu mastrino.**)

'2 Ŝatas drakoj ŝpruci fajron,  
hejmojn forbruligi. .... Devas  
ili por salajro morton, ho,  
instigi." .....

'3 Lilka diris al la drako ;  
"Nian hejmon ŝparu ....  
Donos mi al vi la brakon ; ne  
malbonon faru." .....

'4 Drako ŝin respondis akre ;  
"Ni rilaton rompos. .... Per  
militaj brilparadoj ; mi armile  
pompos." .....

'5 Lilka petis al la drako ;  
"Tamen vivojn lasu. .... Niajn  
domojn kaj kunhomojn ;  
bombe ne frakasu." ; .....

'6 Drako spiras fajrajn  
bombojn ; kaj granatoj krevas.  
..... "Sed ni estas malamikoj ;  
mi malami devas." ; .....

'7 Fajre pafe, pacon trafe ;  
drako ŝin minacas. .... "Pacon  
pledi, gracon cedi ; kiel vi  
aŭdacas?" ; .....

'8 "Ho mia filino kara, ogrojn  
tre atentu. .... ke fervoron  
porhomaran vi ne poste  
pentu!" .....

'9 Lilka petas al patrino ; ke ŝi  
staru firme. .... Ŝi rigardas la  
filinon por protekti ŝirme. ....

'10 Lilka dormas en la domo ;  
pordon ogro frapas. .... Ogro  
doman pordon frapas kaj per  
ungoj skrapas. ....

'11 Monton regas ogro, li sur ;  
Lilka pordo frapas. .... La  
najbaroj time kaj sen;move  
bruon gapas. ; .....

'12 Ogro Lilkan alparolas ;  
"Fi, vi estas judo. .... Mian  
malamegon gregan ; mi sur  
vin altrudos." ; .....

13 Lilka diris al elfino ; "Via  
penso klaras. .... Inter pastroj  
kaj pilastroj ; kredo vasta  
staras." ; .....

'14 E2lfino respondas "Bone ;  
venu nin renkonti. .... Inter  
dioj provas ni ; per unu sama  
ponti." ; .....

'15 "Viajn vortojn en la  
mondo;lingvon mi tradukos  
..... kaj el ĝi plej belajn  
pensajn ; perlojn mi elplukos."  
; .....

'16 "Tiujn perlojn do vi  
montru ; al miaj infanoj. ....  
Venu vi al Agla Monto ; trans  
la oceanoj." ; .....

'17 Lilka venis aglan monton ;  
trans la oceanoj. .... Tie  
perlojn ŝi instruis ; al  
elfininjanoj. ....

'18 Aglo super monto sia ;  
soras, Lilkan vidas. .... Ŝin  
esplori, ĉu laboris, ; fluge li  
rapidas. ; .....

'19 "Ĉu vi nestos, longe restos  
; jen sur mia monto? .... Mi  
decidas, kaj ne fidas ; novan  
enmigronton." ; .....

'20 "Mi al la elfidoj montras ;  
brile perlajn vortojn. .... Ogro  
trans la maro rabas ; for de ni  
la fortojn." ; .....

'21 "Nu, vi rajtas al elfidoj ;  
diri belrakonton. .... Sed vi ne  
ekloĝu mem sur ; mian aglan  
monton." ; .....

'22 "Vidas mi ke vi por nesto ;  
branĉojn jam kolektas. ....  
Tial mi postulas ke vi ; for de  
ni direktas." ; .....

'23 Al la hejma ogra monto ;  
Lilka do revenas .... pro  
ogridoj jam amikoj ; ŝiaj tre  
ĉagrenas .....

'24 Lilka pledas al ogridoj ;  
sed ili respondas .... "Nigran  
la hararon vian ; baldaŭ ni  
fortondas" .....

'25 Homojn kaj la elfojn la  
ogridoj tuj forportos .... "Iros  
vi en groton nian ; kaj vi ĉiuj  
mortos." .....

'26 Fine en la ogran groton ;  
ĉiuj devas iri .... Tie pro  
sufoka fumo ; oni ĉesas spiri  
..... )



## & Promesoj:

< Rekante 28 el 61 batoj por strofo, entute 976 paŝoj dum 11 minutoj. Verkis kaj komponis Mikaelo Bronŝtein. Klarigoj (\*): '4 Korno: metaforo pri kokrato.>

### (#Melodio:

< 976 batoj, 11 minutoj.> (

hLa /Lado miLa h hLa /Lado miLa h; la lala /so so so ofa /mimi h h; mi fami /reLa h hlala lala /miLa h h; mimimi /mimi i imi fisi /lala a

(#Rekantaĵe: /re ere fafa fare /fa; lala fa re; /re ere fafa fala /so o o h; /so oso soso sofa /mi so la; h /mimi sisi sisi la /h h)

)×5 )+

### (&Strofoj:

#### ,& Historia antaŭparolo:

'1 En /mezopoko kruc/kavaliro ; Rapidis /al milita /iro. ; Kiraso /peza – pli ol granda /ŝtono, ; Kaj por l' ed/zino – kirasa /zono.

(×: /Ĉar validas la pro/mes' – ; Unu, du, tri – ; /Post tri jaroj da for/ges'. ; /Pasos baldaŭ la tri /jaroj, kaj ; /Ĉiuj dancos ni kun gaj'/.)

'2 Nobele palis vizaĝ' diskreta, ; Ŝlosilo falis al la poŝ' sekreta. ; Kaj la edzinon li nur benis, pia: ; – Fidela estu je nomo mia. ....

'3 L' edzin' ploretis, naztukon prenis. ; Femurojn belajn kiraso premis. ; Kaj tutsincere promesis la edzin': ; – Sinjoro mia, mi fere amos vin. ....

'4 Forĝisto juna – servuto bela: ; – Ŝlosilon fari? Fu! bagatelo... ; Kruckavaliro sub pluva ŝpruco ; Jam portas kornojn\* anstataŭ kruco. ....

'5 Ĉar la promeso – la edza mendo ; Validas post tri jaroj da atendo. ; Ne ploru edzo! La temp' degelos. ; Tri jaroj pasos. Eble ŝi fidelos. ....

(×: Ĉar validas la promes' – ;  
Unu, du, tri – ; Post tri jaroj da  
forges'. ; Pasos la tri jaroj, kaj  
kun rid'. ; Fidelos ŝi al la  
kokrit'.)

## **,& Parto unua de la promesoj:**

'6 En historio – alia paĝo: ;  
Fondiĝis nia organizaĵo. ;  
Dum tiu fondo mi mem  
aplaŭdis, ; Kaj la promesojn  
unuajn aŭdis. ....

(×: Ĉar validas la promes' – ;  
Unu, du, tri – ; Post tri jaroj da  
forges'. ; Pasos baldaŭ la tri  
jaroj, kaj ; Ĉiuj dancos ni kun  
gaj'.)

'7 Donante ĵuron promesis oni  
; Literaturon por ni eldoni. ;  
Nur lernolibrojn, ne poezion...  
; Ĝis nun ni reve atendas tion.  
.....

'8 Pugnante bruston, promesis  
fere, ; Ke ni vojaĝos – jes – ne  
nur letere. ; Al eksterlando oni  
grupojn sendos... ; Ni ankaŭ  
tion ĝis nun atendas. ....

'9 Kaj sekvis pluraj promesoj  
belaj ; Pri foraj taskoj kaj  
proksimaj celoj, ; Pri la revuo  
kaj pri la regularo. ; En revoj  
pasis la unua jaro. ....

'10 Sed pluraj uloj komencis  
knari: ; – Vi ne promesu, se ne  
povas fari. ; Dum la tendaro  
popol' pasia ; Proponojn  
verkis por la Asocio. ....



'11 Promesis oni: – Ni eklaboros, ; Proponojn viajn ni tuj-tuj esploros. ; Elektos homojn – la plej akuratajn, ; Preparos planon kaj fiksos datojn. ....

'12 La libroj venos al vi libere, ; Tendaroj plenos ĉiusomere. ; Kontentos tute vi pri abono. ; Kaj eĉ vojaĝos, se estos mono. ....

'13 Promesis oni, promesis oni, ; Laciĝis langoj la promesojn doni. ; Sed taskojn oni nun havas ŝvite – ; Transmeti datojn mem alfiksitajn. ....

'14 En revoj pasis ankaŭ dua jaro. ; Promesoj multas, eĉ ne unu faro. ; Nu kial vane vi malpacienas? – ; Tri jaroj pasos – oni komencos. ....

## **,& Finvortoj:**

'15 Nu jen, amikoj, mi mem forgesis, ; Ke ŝajne kanton al vi promesis. ; Babilis multe. Gitaron plukis. ; Vi opinias – mi ekkadukis? ....

'16 Sed miaj karaj, ne gratu dente, ; Kaj ne rigardu min elokvente... ; Ĉu la afero ne estas klara? – ; La kant' aperos ... en la okdek kvara. ....